



V-19034/1971

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

1

1971

Vortoj de Prezidanto Maŭ

“Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro.” Kvankam Ĉinio kaj Albanio estas apartigitaj de miloj da montoj kaj dekmiloj da riveroj, tamen niaj koroj estas interligitaj. Ni estas viaj veraj amikoj kaj kamaradoj. Ankaŭ tiaj vi estas por ni.

Prezidanto Maŭ Intime Intervidiĝis

kun Abdyl Kellezi kaj Aliaj

Albanaj Kamaradoj

La 28-an de septembro, 1970, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ intime intervidiĝis kun kamarado Abdyl Kellezi, alterna membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj prezidanto de la Ŝtata Plana Komisiono, kaj pli ol 70 aliaj albanaj kamaradoj, inkluzive de membroj de la Registara Ekonomia Delegacio de la Popola Respubliko de Albanio gvidata de kamarado Abdyl Kellezi kaj aliaj albanaj amikoj vizitantaj en Pekino.

La albanaj kunbatalantoj, kiuj venis de la plejfronto de la kontraŭimperiisma kaj kontraŭreviziisma batalo, ricevis varman bonvenigon de Prezidanto Maŭ. Kiam kamarado Kellezi kaj la membroj de la delegacio eniris la akceptan salonon, Prezidanto Maŭ kore manpremis kun ili, kaj poste sin fotigis kun ĉiuj albanaj kamaradoj ĉeestantaj. Inter tiuj kamaradoj estis membroj de la albana specialista grupo, la albanaj vira kaj virina korbopilkaĵaj teamoj, la albanaj grupoj por studo de agrikulturo kaj fotografio kaj albanaj studentoj-praktikantoj en Ĉinio. La albanaj kamaradoj varme manklakis por saluti Prezidanton Maŭ. Ili kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Prezidanto Maŭ foje kaj refoje mansvingis al ili en respondo.

Poste, Prezidanto Maŭ havis tre amikan interparolon kun kamarado Kellezi kaj membroj de la delegacio kamaradoj Kico Ngjela, Shinasi Dragoti, Pupo Shyti, Xhorxhi Robo kaj Spiro Rusha.

La intervidiĝon kaj interparolon partoprenis kamarado Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kamarado Kang Ŝeng, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĈ kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj, kamarado Li Hiannian, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj kamaradoj Li Kiang, Fang Ji kaj Baj Hiangguo.

La intervidiĝan ceremonion ĉeestis respondecaj kamaradoj de koncernaj departementoj Ju Sang, Kiaŭ Guanhua, Feng Jongŝun, Ĝang Giĝi, Caŭ Ĉeng, Hie Huajde, Ŝen Gian, Ki Jiding, Li Guanhjun, Ĉen Dehe kaj Ĉen Maŭ.



Prezidanto Maū kore manpremas kun kamarado Kellezi.



Foto farita dum la intervido. La kvin



1 de maldekstre estas kamarado Abdyl Kellezi.

Vizito de Albana Registara Ekonomia Delegacio al Ĉinio

LA 14-an de aŭgusto de 1970, kamarado Abdyl Kellezi, kandidata membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj prezidanto de la Ŝtata Plana Komisiono, kaj la Registara Ekonomia Delegacio de la Popola Respubliko de Albanio sub lia gvido venis al nia lando por fari amikan viziton, laŭ nia invito.

Tiuvespere, Vicĉefministro Li Hiannian donis bankedon por varme bonvenigi la albanan registaran ekonomian delegacion estratan de kamarado A. Kellezi. Kiam kamaradoj Abdyl Kellezi, Kico Ngjela, Shinasi Dragoti, Pupo Shyti, Xhorxhi Robo kaj Spiro Rusa venis en la bankedan salonon akompanate de kamaradoj Li Hiannian kaj aliaj,

La albana ekonomia delegacio venis al Pekino.



La Ĉina kaj Albana Popoloj Interligiĝas Koron kun Koro

La ĉina kaj albana junularoj interligiĝas koron kun koro.



Dum sia pre-
albanaj reve-
nis al la Pop-
Amikeco in-
banio en la
por partopre-
kaj ili intin-
ĝiaj komunt-

Ĉinaj teknik-
en la Ŝpintek-
Zedong de
starigis pro
amikecon ku-
ristoj en kor-
reciproka lei-





Vizito al la aŭtofabriko en Ĉangĉun

ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj varme manklakis por bonvenigi la heroajn albanajn kunbatalantojn el la batalfronto kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Kiam la revolucia movado de Albanio venke disvolviĝis, la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio akiris grandan venkon kaj la monda revolucio estis en bonega situacio, la ĉinaj kaj albanaj kamaradoj kaj kunbatalantoj kunvenis kun apartaj intimeco kaj ĝojo. Ili foje kaj refoje tostis por la nerompebla revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la du partioj, du ŝtatoj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Albanio, por la senĉesa disvolviĝo de la interhelpa rilato inter Ĉinio kaj Albanio, por ankoraŭ pli grandaj venkoj de Albanio en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, por la sano de la granda gvidanto de la ĉina popolo kaj la plej intima amiko de la albana popolo Prezidanto Maŭ kaj por la granda gvidanto de la albana popolo kaj la plej intima amiko de la ĉina popolo kamarado Enver Hoxha!

Kamaradoj Li Hiannian kaj Abdyl Kellezi faris ĉe la bankedo, unu post la alia, paroladojn plenajn de revolucia patoso. Kaj iliaj paroladoj vekis jen kaj jen varmajn manklakojn en la tuta salono.

La 18-an de aŭgusto, kamarado A. Kellezi kaj la albana registara ekonomia delegacio sub lia gvido vizitis Kinghua-universitaton.

Kiam A. Kellezi kaj aliaj albanaj kamaradoj venis, sub akompanado de respondeculoj de koncerna departemento Laj Gifa kaj Hie Huajde, al tiu inĝenier-sciencia universitato plena de revolucia viveco, ili estis varme bonvenigataj de la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la universitato, la respondeculoj de la partia komitato kaj la revolucia komitato de la universitato kaj la revoluciaj instruistoj kaj studentoj.

Kamarado A. Kellezi kaj la aliaj kamaradoj de la delegacio kunsidis kaj interparolis kun revoluciaj kadroj, instruistoj, junaj ruĝgvardianoj kaj nove alvenintaj studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili kun granda intereso aŭskultis raportojn de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj pri ilia sperto en firma efektiviĝo de la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ kaj en eduka revolucio. Kamarado A. Kellezi laŭdis kaj varme gratulis la atingojn akiritajn de la universitato en plenumo de la politiko de Prezidanto Maŭ pri kadroj kaj intelektuloj kaj en kulturo de novaj proletaraj intelektuloj. Kaj li konigis al la revolu-

ciaj instruistoj kaj studentoj de Kinghua-universitato pri la atingoj de la albanaj altlernejoj en pluapasa revoluciigo sub la gvido de kamarado Enver Hoxha kaj la Albana Partio de Laboro.

Post la kunsido, A. Kellezi kaj la aliaj albanaj kamaradoj pririgardis la elektronan sintezan eksperimentan fabrikan starigitan de la universitato per propraj fortoj por efektiviĝi la principon de kombino de instruado, scienca esplorado kaj produkto. Dum la pririgardo, kamarado A. Kellezi havis korajn interparolojn kun laboristoj, studentoj kaj instruistoj laborantaj en la fabriko kaj atente rigardis produktaĵojn projektitajn kaj faritajn de ili mem.

Kaj krome, la albana registara ekonomia delegacio vizitis ankaŭ la Okcidentkvartalan Fabrikon de Duonkondukantaj Ekipaĵoj kaj la Laborejon de Metiartaĵoj de Pekino kaj Mijun-akvokonservejon.

La 27-an de aŭgusto, A. Kellezi kaj la aliaj albanaj kamaradoj vizitis la Popolan Komunumon de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio kaj ricevis varman bonvenigon.

Kiam A. Kellezi kaj la aliaj albanaj kamaradoj venis, akompanate de kamarado Hie Huajde, vices-tro de la ĉina Komisiono por Ekonomiaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj, al la Popola Komunumo

de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio, la komunumanoj sonigis gongojn kaj tamburojn kaj senĉese kriadis svingante naciajn flagojn de Ĉinio kaj Albanio: "Vivu la batala amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj!" "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu kamarado Enver Hoxha!" Kaj kamarado A. Kellezi entuziasme kriis kune kun ili: "Enver — Maŭ Zedong!" "Maŭ Zedong — Enver!"

A. Kellezi kaj la aliaj albanaj kamaradoj esprimis laŭdojn kaj varmajn gratulojn al la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio pro ĝiaj sukcesoj akiritaj en la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj persistado ĉe la orientilo elmetita de Prezidanto Maŭ "sinapogo sur la propraj fortoj" kaj "penema luktado en malfaciloj".

La albanaj kamaradoj pririgardis en la komunumo bredejon de laktobovinoj, kultivejon de rizo, bredejon de anasoj, kuracejon kaj riparejon de agrikulturaj maŝinoj kaj partoprenis fizikan laboron en ĝia fruktoĝardeno.

Kamaradoj de la albana ambasadorejo en Ĉinio multfoje laboris en tiu fruktoĝardeno. Tiutempe, abundis fruktoj sur la persikarboj en la ĝardeno. Montrante korbon plenan de grandaj persikoj, kiujn oni deprenis por regali la gastojn, kamarado A. Kellezi diris: Ili estas fruktoj de la amikeco inter la ĉina kaj albana popoloj.

Vizito al radio-fabriko funkciigata de loĝkvartalo en la okcidenta distrikto de Pekino





Vicĉefministro Li Hiannian kaj Abdyl Kellezi, estro de la albana registara ekonomia delegacio kaj prezidanto de la Ŝtata Plana Komisiono, subskribas la interkonsentojn.

Tagmeze, la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio regalis la albanajn kamaradojn per simpla festeno.

Antaŭtage de la Nacia Festo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ intime intervidiĝis kun kamarado A. Kellezi kaj la albana registara ekonomia delegacio sub lia gvido.

La 1-an de oktobro, la albanaj kamaradoj ĝoje pasigis la solenan feston de la 21-a datreveno de la fondiĝo de nia granda socialisma patrolando, kune kun centmiloj da armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo.

Por plipaŝe plifortigi la nerompeblan batalan amikecon inter la du popoloj kaj senĉese disvolvi la ekonomian interhelpon sub la direktado de Marksismo-Leninismo kaj la principo de proletara internaciismo kaj en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de la Popola Respubliko de Albanio subskribis en Pekino je la 16-a de oktobro la interkonsenton pri dono de longtempa senintereza prunto de Ĉinio al Albanio.

Samtempe kun tio, estis subskribitaj interkonsento pri livero de kompletaj ekipaĵoj de Ĉinio al

Albanio kaj interkonsento pri livero de ordinara materialoj de Ĉinio al Albanio.

Post la subskribado, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj donis bankedon por regali A. Kellezi kaj la aliajn kamaradojn.

Post pririgardo de la aŭtuna foiro de eksportaj varoj de nia lando de 1970 je la 17-a de oktobro, kamarado A. Kellezi kaj la Registara Ekonomia Delegacio de la Popola Respubliko de Albanio sub lia gvido finis sukcesplene sian amikan viziton al nia lando kaj forlasis Kantonon per aviadilo por reiri al sia patrolando, kun abundo de profunda proletara amikeco de la ĉina popolo al la frata popolo de Albanio.

Ĉen Ju, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj vicestro de la Revolucia Komitato de Guangdong-provinco, kaj Hie Huajde, vicestro de la Komisiono por Ekonomiaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj, kiu speciale venis al Kantono por akompani A. Kellezi kaj la aliajn albanajn kamaradojn en vizito, kaj pli ol mil revoluciaj popolanoj varme adiaŭis la heroajn albanajn kunbatalantojn en aerodromo.



Vizito al la pneŭmatika laborejo de la riparejo de la popola komunumo Sigiking de Pekino

Pririgardo al rizkampo de la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio



Triumfa Kanto super Dropull-ebenejo

Korespondaĵo el Albanio

DROPULL-EBENEJO, kiu sterniĝas en la baseno de Drino-rivero kaj ligiĝas kun Gjirokaster-ebenejo en la malsupra baseno de Drino, estas grenejo de Gjirokaster-regiono en suda Albanio. Irigaciaj kanaloj interplektiĝas sur la kampoj, kie la plantoj verdas kaj membroj de agrikulturaj kooperativoj intense laboras.

MIZERO ANTAŬ LIBERIĜO

Antaŭ la Liberiĝo, la tuta Dropull-ebenejo estis en la manoj de kvar bienuloj. Kvankam la malriĉaj kamparanoj ŝvitante laboregis tutjare por la bienuloj, tamen ili devis vivi sen vestoj kaj en malsato. Krom la senfina mizero kaŭzita de subpremado de la bienuloj estis ankaŭ katastrofoj alportitaj de Drino-rivero, kiu inundis post troaj pluvoj en vintro kaj tute sekiĝis en scmero pro akva reduktiĝo komenciĝinta ekde printempo. En la seka sezono, la tero kreviĝis pro sekiĝo, kaj la plantoj velkis antaŭ sia maturiĝo. Eĉ trinka akvo estis tre malmulta. La ekspluatado de la bienuloj kaj la minaco de naturaj katastrofoj devigis sennombrajn popolanojn de Gjirokaster fuĝi el sia hejmloko al fremdaj landoj kie ili vivis tragikan vivon. De longaj jaroj la popolo aspiris emancipiĝi, faligi la bienulojn kaj dividi ilian teron por turni la katastrofplenan Dropull en grenan produktejon.

ALVENIS BRILA PRINTEMPO

Forpasis la frosta vintro kaj alvenis brila printempo. Sub la gvido de la Albana Partio de Laboro la tuta popolo sangverŝe kondukis rezistan militon, fine elpelis la italajn kaj germanajn faŝistojn kaj liberigis la tutan Albanion. Post la Liberiĝo, la Partio gvidis la kamparanojn fari agraran reformon

kaj de tiam la kamparanoj de Dropull-ebenejo fariĝis mastroj de sia tero. Ili firme decidis realigi sian grandan idealon transformi la 12,000-hektaran ebenejon en fekundajn kampojn sur kiuj bonaj rikoltoj estas garantiataj en tempoj ĉu de sekeco ĉu de superakvo.

Antaŭlonge en 1947, la kamparanoj tie jam komencis fosadon de kanaletoj por irigacii teron en malgrandaj areoj. Poste, kun la helpo de la laborista klaso ili konstruis akvokonservejon kun kapacito de 2 milionoj da kubmetroj, kiu metis 1,000 hektarojn da tero sub irigacion. Post la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro, la vastaj laboristaj amasoj, respondante al la alvoko de la Partio ke "agrikulturo estas afero de la tuta popolo", plie helpis la agrikulturajn laborulojn kaj, kune kun la kamparanoj de la baseno de Drino unuanime komencis la marŝon por venki Drino-riveron.

En 1967, akvoutiligaj teknikaj laborantoj de la Grundreforma Buroo de Gjirokaster-regiono venis al la bordoj de Drino. Ili serĉis akvajn fontojn kaj faris mezurojn kaj esploron por konstrui kanalon por dreni vintran superakvon de la rivero.

Unu jaron poste, komenciĝis la konstruado de kanaloj sur la bordoj de la rivero. Fosmaŝinoj senĉese zumadis movante sian feran brakon kun ĉerpilo, kaj kamionoj plenŝarĝitaj de tero kuris tien kaj reen sur malebenaj vojoj. Volontula labora armeo konsistanta el miloj kaj miloj da laboristoj, instituciaj kadroj kaj studentoj el Gjirokaster sin ĵetis en la kanalfosan batalon sur la vasta tero.

Samtempe kun tio, oni klarionis ankaŭ la batalon por konstrui Doft-akvokonservejon sur la maldekstra bordo de supra fluo de Suhe, branĉo de Drino. Buldozoj eligis surdigajn bruojn en laboro, tuno

post tuno da dinamito eksplodigis rokojn sub la piedo de Buretos-monto. Ekbolis la tuta Doftrajono.

FIRMA VOLO EN BATALO KONTRAŬ LA NATURO


La laboristoj en la akvoutiliga konstruado firme tenis en sia koro la vortojn de kamarado Enver Hoxha: **“Pliigi grenan produkton estas la fundamenta tasko de agrikulturo kaj la tuta nacia ekonomio.”** En la varmega somero fosmaŝinistoj persistis en sia laboro sidante en sia haŭtbruliga manipulejo; en pluvaj tagoj de vintro, la fosmaŝinoj daŭre svingadis kiel ordinare siajn ferajn brakojn. Kelktempe, kiam stagniĝis multe da pluvakvo sur la konstruejo, ĝi fariĝis ŝlimejo kaj la pezaj fosmaŝinoj ofte enmarĉiĝis kaj ĉesis moviĝi. Tamen, malfaciloj neniel povis timigi la laboristojn edukitajn de la Albana Partio de Laboro. Ili fine solvis la problemon de enŝlimiĝo per meto de ŝtipoj sub la fosmaŝinojn.

En vintro de 1969, kaptante ŝancon de kelkaj senpluvaj tagoj kaj malprofundiĝo de la akvo en Suhe-rivero fosmaŝinisto Dhodhori Ratdho direktis sian maŝinon al rivera bordetendaĵo por fosi sablon por la konstruado de digo. Li estis absorbita de la streĉa laboro tiel, ke li tute ne rimarkis la ŝanĝiĝon de la vetero. Subite ektorentis pluvo. Antaŭ ol li havis tempon por veturigi la maŝinon for de la etendaĵo, lin kaj la maŝinon jam sieĝis la ŝvelinta rivera akvo kaj la monttorento. Rokoj balaitaj malsupren de monta torentego frapadis la maŝinon, kaj ankaŭ Ratdho estis en danĝero.

Ĝuste en tiu kriza momento, Andon Birnjo, juna kamion-ŝoforo kaj kelkaj aliaj laboristoj rapidis al la rivera bordo. Komenciĝis intensa batalo por savi la klasan fraton kaj la ŝtatan posedaĵon. Brava Birnjo tuj saltis en la rapidegan fluon sen konsidero pri sia sekuro kaj naĝis rekte al la maŝino. Li unue helpis Ratdho surbordiĝi kaj poste kune kun la aliaj laboristoj sukcesis sekurigi la maŝinon.

Albanaj gejunuloj laboras kiel volontuloj por krei ŝtuparkampojn sur montodeklivo.





Albanaj laboruloj konstruas irigacian tubolinion por konduki akvon sur monton kaj ŝanĝi la fizionomion de la kamparo.

PLANTOJ KRESKIS BONE SUB IRIGACIO

Dank' al la sinforĝesa laboro de la laboristoj kaj kuna penado de miloj kaj dekmiloj da kamparanoj, instituciaj kadroj kaj studentoj Doft-akvokonservejo finkonstruiĝis en junio de 1970, du jarojn antaŭ la fiksita dato. Digo pli ol 10 metrojn alta kaj pli ol 2,000 metrojn longa estis starigita laŭlonge de Suherivero. Akvo enkondukata el la rivero en la akvokonservejon lazure ondetas. De tie la klara akvo elfluas en larĝan kaj profundan cementitan kanalon ĉe la piedo de Buretos-monto. Nemalproksime antaŭe, en tiu ĉi ĉefa kanalo estas akvobarilo kiu dividas la fluon en du branĉojn por irigacii la teron de 15 vilaĝoj en la baseno de Drinorivero.

La interkruciĝaj drenaj kaj irigaciaj kanaloj sur Dropull-ebenejo havas totalan longecon de pli ol 100 kilometroj. Finkonstruiĝo de la drenaj kanaloj ebligis al la ebenejo semadon de vintra tritiko komence de 1969. En somero de 1970, riĉa rikolto de tritiko estis akirita en tiu regiono, kaj en aŭtuno estis akirita abunda rikolto ankaŭ de maizo.

Jam forpasis por ĉiam la tagoj, en kiuj Dropull suferis de sekeco en somero kaj inundo pro akvostagno en vintro. Kun fera volo kaj per diligenta laboro la heroaj albanaj laboristoj kaj agrikulturaj kooperativanoj venkis la naturajn katastrofojn kaj ŝanĝis la postrestecan fizionomion de tiu loko. Drinorivero, kiu longajn jarojn alportis malutilon, estis jam jungita de la heroa popolo. La pli ol 60 kilometrojn longa trunka kanalo serpentumas ĉirkaŭ la montoj kvazaŭ granda arterio senĉese nutrante la senlimajn smeraldajn kampojn sur la ebenejo.

Eterne Vivu la Batala Amikeco el Sango inter la Ĉina kaj Korea Popoloj

— Memore al la 20-a datreveno de la ekpartopreno de la Ĉinaj
Popolaj Volontuloj en la korea milito

En 1950, la usona imperiismo senskrupule lanĉis agresan militon kontraŭ Koreio, intencante per unu bato okupi la tutan Koreion kaj poste ataki la ĉinan ĉeferon. Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ helpi Koreion en batalo kontraŭ Usono kaj defendi la patrolandon, la ĉina popolo sendis la Ĉinajn Popolajn Volontulojn por batali kune kun la frata korea popolo, kaj post sanga batalo de pli ol 3 jaroj ili finfine venkis la usonan imperiismon kaj akiris grandajn venkojn.





Dekmiloj da kantoj kaj dekmiloj da vortoj ne povas plene esprimi la batalan amikecon el sango inter la ĉina kaj korea popoloj. Ĉe la adiaŭa momento, iu korea onklino kore brakumas batalanton de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kiu tuj revenos al sia patrolando kun profunda amikeco de la korea popolo.

La Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj formis nerompeblan revolucionan amikecon inter si en reciproka subteno kaj komuna batalo. Jen komandantoj de ambaŭ landoj interkonsiliĝas sur fronto pri operacia plano.





La ĉina kaj korea popoloj ĉiam estas solide unuiĝintaj en la komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj formis batalan amikecon el sango. La foto montras ke dum la sangkamrjeng-a kampanjo, heroaj koreaj polanoj, spite de malamika kanonado, tagnocte transportas municion al pozicioj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.

Sub la saĝa gvido de sia granda gvidanto kamarado Kim Il Sen kaj en bona kunagado de ĈPV la heroa Korea Popola Armeo venkis, post brava batalo de pli ol 3 jaroj, la armitan agreson de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj, kaj tiel starigis, por la tutmondaj subpremataj nacioj kaj popoloj, brilan ekzemplon de multimo al perfortaĵo kaj kuraĝo por batalo kaj venko.





Se la malamikoj ne kapitulacas, ni eks-termu ilin! La Ĉinaj Popolaj Volontuloj, sturmas la pozicion de la malamikoj spite de intensa bombardado.




Sub la forta bato de la armeoj kaj popoloj de Koreio kaj Ĉinio, la arogantaj usonaj imperiistoj finfine trafis hontindan malvenkon kaj elmontris sian propran vizaĝon de papera tigro.



La Popola Komitato de Pjongjango okazigis solenan mitingon en la Halo de Mansudaj por memorigi la 20-an datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio.

La Granda Amikeco el Sango



Sur la podio de la memoriga mitingo de Pekino pri la 20-a datreveno de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio

LA 25-a de oktobro de 1970 estis la 20-a datreveno de la eniro en la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio. Kun profunda revolucia sento, la ĉina popolo memorigis, kune kun la frata korea popolo, la batalan tagon de niaj du popoloj en rezisto kontraŭ la agresado de la usona imperiismo.

Posttagmeze de la 24-a de oktobro, 10,000 revoluciaj popolanoj de la ĉefurbo de nia lando okazigis solenan mitingon por memorigi la 20-an datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio. Kiam la ambasadoro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio al Ĉinio Hen Ĝun Ge kaj aliaj koreaj kamaradoj kaj Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Kang Ŝeng, membro de KK de PB de CK de KPĈ

kaj vicĉefkomitatano de KK de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj, Huang Jongŝeng, membro de PB de CK de PKĈ kaj estro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA, kaj Giang King, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan kaj Je Kjun, membroj de PB de CK de KPĈ k.a. kamaradoj, kune eniris la kunvenojn, la ĉeestantoj ĉiuj ekstaris kaj longdaŭre kaj varme manklakis.

Kamarado Huang Jongŝeng, kamarado Hen Ĝun Ge kaj reprezentanto de la antaŭaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj kamarado Huang Zongde faris, unu post alia, paroladon en la mitingo. En siaj paroladoj ili plene esprimis la ŝtalan volon de la du popoloj kaj la du armeoj de Ĉinio kaj Koreio ĝisfine batali kontraŭ la usona imperiismo kaj japana militarismo, varme laŭdis la grandan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la du popoloj kaj la du armeoj de Ĉinio kaj Koreio. Iliaj paroladoj de tempo

al tempo vekis tondran manklakadon en la tuta kunvenejo.

En sia parolado Ambasadoro Hen Ĝun Ge diris: En la tempo de celebrado de la 20-a datreveno de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio, kiam nia popolo refoje retrorigardas la jarojn de intensa militado dum kiuj ĝi sangverŝe batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la ĉina popolo en la sama tranĉeo por oponi kontraŭ la komuna malamiko la usonaj imperiismaj agresantoj, ni plifirmigis nian decidon komplete elpeli la damnindajn malamikojn la usonajn imperiistojn el nia teritorio kaj realigi la reunuiĝon de la patrolando.

Ĉiuj scias, ke frue antaŭ 100 jaroj la damninda malamiko la usona imperiismo jam komencis agresadon kontraŭ nia lando, kaj post la liberiĝo de nia lando ĝi okupis sudan Koreion, senĉese faris konspiradojn de agreso kaj milito kaj je la 25-a de junio de 1950 lanĉis rabistan agresan militon kontraŭ nia popolo.

Lanĉante la agresan militon en Koreio, la usonaj imperiismaj agresantoj senskrupule intencis strangoli la junan Demokratian Popolan Respublikon de Koreio en la lulilo, turni la tutan Koreion en sian plenan kolonion kaj sklavigi nian popolon kaj plie agresi la ĉinan ĉefteron.

Sur la militan kampon en Koreio, la usona imperiismo mobilizis kolosajn armitajn fortojn


en nombro de pli ol du milionoj de armeanoj ampleksantaj trionon de ĝia tera armeo, kvinonon de ĝia aera armeo, la Pacifikan Floton, trupojn de 15 vasalaj landoj kaj la marionetan armeon de suda Koreio, uzis grandajn kvantojn da plej novaj bataliloj, alprenis kiel eble plej barbarajn metodojn kaj rimedojn de militado senprecedencajn en la milita historio.

Li diris, ke en la korea milito plej intensa kaj plej kruela en la historio de la homaro kaj daŭranta pli ol tri jarojn, la du popoloj kaj du armeoj de Koreio kaj Ĉinio disvolvis senkomparan kolektivitan heroismon en la batalo kontraŭ la malamikoj; la firma unuiĝo inter la du popoloj de Koreio kaj Ĉinio fariĝis viva ekzemplo de proletara internaciismo.

La bravaj ĉinaj popolaj volontuloj, kiuj ĵetis sin en la batalkampon en Koreio, fidele plenumis la instruon de sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke ili amu la Demokratian Popolan Respublikon de Koreio, la Korean Laboran Partion kaj la korean popolon same kiel sian landon, sian partion kaj sian popolon, **“amzorgu ĉiun monton, ĉiun akvon, ĉiun herbon kaj ĉiun arbon de Koreio”**, kaj brile konservis la honoron de internaciismaj batalantoj en ĉia ajn malfacila cirkonstanco.

La Ĉinaj Popolaj Volontuloj batalis kun la Korea Popola Armeo ŝultron ĉe ŝultro en la sama tranĉeo, defendis per sia sango altaĵojn kaj vilaĝojn de

Sceno de la memoriga mitingo de Pekino



Koreio same kiel la teron de sia patrio, disvolvante sentiman spiriton en la batalo kontraŭ la malamikoj.

Heroo Huang Giguang ŝtopis per sia korpo paftruon de malamika bastiono kaj garantiis per tio venkon de batalo. Antaŭ sia vivofero li diris: "La kugloj de la malamiko povas senigi min je la vivo sed ne povas senigi la amindajn koreajn gefratojn je la vivo."

Tian heroaĵon faris absolute ne nur Huang Giguang sola. En la vicjoj de la bravaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj troviĝis miloj post miloj da herooj samkiel Huang Giguang. Ĉiuj bravaj popolaj volontuloj faris militajn meritojn kiuj eterne vivos en la koro de la popolo.

La bravaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj montris sian noblan moralon. La bravaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj ne nur batalis sentime, sed ankaŭ savis multajn vivojn kaj posedaĵojn de nia popolo sub barbaraj bombadoj de la usona imperiismo spitante vivdanĝeron, helpis multajn rifuĝantojn per sia ŝparita greno porcio, utiligis batalajn intertempojn por helpi kamparanojn de nia lando en printempa semado kaj en riparado de ŝoseoj kaj pontoj.

Eterne enskribiĝis en la historion de nia lando la heroismo kaj batalaj meritoj kiujn faris la bravuloj de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj sur la batakkampo en Koreio.

La popolo de nia lando por ĉiam memoras kaj dankas la noblajn internaciismajn helpojn kaj subtenojn kiujn la frata ĉina popolo donis al ni en la periodo de nia Patrolanda Liberiga Milito.

La Patrolanda Liberiga Milito kiun faris la korea popolo por pli ol tri jaroj kontraŭ la agreso de la usona imperiismo finiĝis per la granda venko de la korea popolo.

Posttagmeze de la 24-a de oktobro, en la ĉefurbo de Koreio la Popola Komitato de Pjongjango okazigis solenan mitingon por memori la 20-an datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio. La Amika Delegacio de la Ĉina Popolo, kiu estis vizitanta Koreion, ĉeestis la mitingon laŭ invito.

Kiam Zeng Siju, estro de la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo, Ĉen Hianĵuj, ĝia vicestro, kaj ĝiaj aliaj membroj ascendis la podion sub la akompano de la unua vicĉefministro Kim Il, la dua vicĉefministro Pak Sen Ĉel, la estro de la Ĝenerala Stabo Oh Ĝin Vu kaj aliaj koreaj partiaj kaj registaraj gvidantoj, la orkestro ekludis bonvenigan muzikon, kaj ĉiuj ĉeestantoj stariĝis kaj manklakis por varme

bonvenigi la ĉinajn kunbatalantojn. Kiam kamarado Kim Il kaj la delegacia estro Zeng Siju intime manpremis, longdaŭre tondris varma manklakado en la kunvenejo.

Post kiam Ĉefkomitatano Kan Hi Vun deklaris malfermon de la mitingo, Ĉefgeneralulo Oh Ĝin Vu, membro de la Politika Komitato de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Korea Popola Armeo, kaj la delegacia estro Zeng Siju faris paroladon unu post alia. De tempo al tempo iliaj paroladoj estis interrompitaj de varma manklakado.

En sia parolado la delegacia estro Zeng Siju diris: Ĉinio kaj Koreio interdependas kiel lipoj kaj dentoj kaj la popoloj de la du landoj intimas kiel fratoj. Ni neniam forgesos, ke en la tagoj kaj noktoj kiam ni batalis ŝultron ĉe ŝultro, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ricevis varmajn zorgojn kaj helpojn de la korea popolo. Traktante same kiel siajn popolajn soldatojn, miloj kaj dekmiloj da koreaj geonkloj kaj gefratoj ĉu en tagoj ĉu en noktoj, timante nenan malfacilon kaj spite al kugla pluvo

Hontinda fiasko de la usona imperiismo sub la bato de la ĉina kaj korea popoloj



kaj frosta neĝoblovo, transportis grenon kaj municion al la popolaj volontuloj, riparis pontojn kaj vojojn, lavis vestojn kaj kudris litkovrilojn por ili, savis vunditojn klopodante tiel en la fronto kiel en la postfronto. Por savi batalantojn de ĈPV multaj koreaj kunbatalantoj oferis sian vivon. La nobla internaciisma amikeco de herooa patrino An Ok Huj, internaciisma batalanto Pak Ĝej Gen kaj sennombraj aliaj koreaj herooj kaj la tuta korea popolo al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ĉiam vaste cirkulas kaj estas laŭdata inter la popolanoj de nia lando.

Li diris: En la lastaj kelkaj jaroj, la usona imperiismo senĉese intensigas antaŭenpuŝon de la agresa politiko de longdaŭra okupado de suda Koreio kaj foje post foje faras militajn provokojn kaj militajn minacojn. Sub la instigo kaj patronado de la usona imperiismo la jam reviviĝinta japana militarismo senkaŝe etendis siajn agresajn ungegojn en sudan Koreion kaj teritorion de nia lando Tajvan, grupigis la marionetan klikon de Pak Ĝun Hi kaj la banditan klikon de Ĉiang Kajŝek por formi "interligan komitaton", pliaŝe inten-

sigas la okcidentpacifikan agresivan militan aliancon kun la usona imperiismo kiel la postkulisa mastro kaj Japanio kiel la ĉefa parto, direktas la agresan lancon rekte al la korea popolo, la ĉina popolo kaj la popoloj de Hindaĉinio kaj de Azio.

Sed la nesubigebla korea popolo majeste staranta ĉe la kontraŭimperiisma plejfronto en la Oriento estas nevenkebla. Antaŭ la herooa korea popolo, antaŭ la forto de la unuiĝo inter la ĉina kaj korea popoloj kaj la tri hindaĉiniaj popoloj, antaŭ la revolucia forto de ĉiuj popoloj de Azio, se la usona imperiismo kaj la japana militarismo aŭdacos lanĉi novan agresan militon, ili certe rompos al si la kapon kaj fiaskos pli tragike. Ni firme konvinkiĝis, ke la 3,000-lia vastaĵo de la bela patrolando de Koreio certe akiros sian reunuiĝon kaj la 40 milionoj da koreaj popolanoj certe denove vivos kune. La revolucia batalo de la diversaj popoloj de Azio fine akiros venkon.

La batala amikeco inter la ĉina kaj la korea popoloj formita el sango kaj starigita sur la bazo de la proletara internaciismo estas tre kara. En sia

Ĉinaj popolaj volontuloj kaj batalantoj de la Korea Popola Armeo batalis ŝultron ĉe ŝuldro en la milito kondukita de la ĉina kaj korea popoloj kontraŭ la agreso de la usona imperiismo.



instrukcio donita je la 19-a de januaro de 1951 al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ diris: “La kamaradoj de Ĉinio kaj Koreio devas unuiĝi kiel fratoj, dividi inter si ĝojon kaj suferon, vivi unu saman sorton kaj ĝisfine batali por venki la komunan malamikon.” La granda gvidanto de la korea popolo kamarado Ĉefministro Kim Il Sen montris: “En la batalo kontraŭ la agresantoj kaj iliaj lakeoj, la popoloj de Koreio kaj Ĉinio profunde komprenas el siaj spertoj, ke la sortoj de la du popoloj estas firme interligitaj kaj nedisigeblaj.” La ĉina popolo kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo tre alte taksas la amikecon kaj unuiĝon kun la frataj koreaj popolo kaj armeo kaj decidis fari penadojn por plifortigi la amikecon kaj unuiĝon inter ni. Hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj sekvante la konstantajn instruojn de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la sepcentmiliono ĉina popolo decidis firme unuiĝi kaj batali ŝultron ĉe ŝultro kun

la korea popolo ĝis la kompleta venko en la komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la japana militarismo.

La grandiozaj memorigaj aktivadoj de la korea kaj ĉina popoloj por celebri la 20-an datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio kaj la historia venko de la korea kaj ĉina popoloj en komuna fiaskigo de la usonaj agresantoj elokvente pruvis: La stariĝinta granda korea popolo estas neofendebla, la stariĝinta granda ĉina popolo estas neatencebla kaj la unuiĝa batala forto de la popoloj de Koreio kaj Ĉinio estas nevenkebla.

La granda unuiĝo kaj batala amikeco inter la korea kaj la ĉina popoloj montritaj en la milito de rezisto kontraŭ la usona imperiismo estas brila ekzemplo de internaciismo kaj patriotismo.

Vivu la granda amikeco el sango de la ĉina kaj korea popoloj!



La Ĉinaj Popolaj Volontuloj

En junio de 1950, la usona imperiismo faris barbaran agresan militon kontraŭ la korea popolo kaj uzurpinte la nomon de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, organizis la t. n. UNO-trupojn komandatajn de usonaj oficiroj kaj per tiuj atakis la korean popolon kun la intenco per unu bato strangoli la junan Demokratian Popolan Respublikon de Koreio. Samtempe kun tio la usona imperiismo okupis per armitaj fortoj Tajvan-provincon, la teritorion de nia lando. Sub la saĝa gvido de sia granda gvidanto kamarado Kim Il Sen kaj la Korea Labora Partio, la heroo korea popolo leviĝis al rezisto kaj komencis la grandan Patrolandan Liberigan Militon de Koreio.

En septembro de la sama jaro, la usona imperiismo etendis la agresan militfajron al la ĉeftero de nia lando, senĉese bombadis kaj mitralis kontraŭ la Nordoriento de nia lando, kio serioze minacis la sekurecon de nia lando. Sekvante la instruon de la

granda gvidanto Prezidanto Maŭ helpi Koreion en milito kontraŭ la usonaj agresantoj kaj defendi la patrolandon, la ĉina popolo elsendis je la 25-a de oktobro de la sama jaro la Ĉinajn Popolajn Volontulojn konsistantajn el siaj elstaraj gefiloj al fronto en Koreion por bati la usonajn agresantojn ŝultron ĉe ŝultro kun la korea popolo en kompakta kunagado.

En la periodo de oktobro de 1950 ĝis majo de 1951, la koreaj kaj ĉinaj trupoj faris 5 sinsekvajn operaciojn, kaj per tio pelis la trupojn de Usono kaj ĝiaj satelitaj landoj de bordo de la landlima rivero Jalu inter Ĉinio kaj Koreio ĝis la 38-a paralelo kaj devigis la usonan imperiismon akcepti armistitan intertraktadon.

Dum la intertraktado, la usonaj agresantoj denove faris multfojajn atakojn, eĉ ekstreme senhomecan bakterian militon, sed ĉiuj ĉi tiuj estis frakasitaj de la korea kaj ĉina

popoloj. En majo de 1953, post la venko de la somera ofensivo de la koreaj kaj ĉinaj popolaj trupoj, la usona imperiismo devigite subskribis la “Korean Armistitan Interkonsenton” je la 27-a de julio de la sama jaro.

En la trijara milito, la koreaj kaj ĉinaj popolaj trupoj ekstermis sume 1,090,000 malamikojn, inter kiuj estis 390,000 usonaj agresaj armeanoj.

La granda venko de la korea milito defendis la frukton de revolucio de la korea popolo, sekurigis Ĉinion, plene pruvis la papertigran naturon de la usona imperiismo kaj ekstreme forte kuraĝigis la tutmondajn subprematajn naciojn kaj popolojn kaj multe levis ilian revolucionan volon de la batalo kontraŭ imperiismo.

Plenuminte la gloran mision komisiitan de la popolo de sia patrolando, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ĉiuj revenis el Koreio al Ĉinio en oktobro de 1958.

Nova Paĝo en la Amika Historio de Ĉinio kaj Koreio

*Kiam la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo atingis Sarivon,
ĝi estis varme bonvenigata de koreaj laborantaj popolanoj.*



EN la heroa Koreio prezentiĝis superba bildo: lazura firmamento, oraj kampoj, smeraldaj pinoj kaj cipresoj, skarlataj aceraj folioj . . . En la jaro 1970, la korea agrikulturo refoje akiris riĉan rikolton. Senĉese aŭdiĝis informoj pri venkoj sur industria fronto. Ĉie aperis revolucia sceno plena de viveco.

En la tagoj kiam la korea popolo memorigis la 20-an datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio, komisiite de la ĉina popolo la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo kun Zeng Siju kiel estro kaj Ĉen Hianĵuj kiel vices-tro veturis laŭ invito al Koreio por partopreni la memorigajn aktivadojn.

Multaj membroj de la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo estis batalaj herooj de la antaŭaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj aŭ militis en Koreio dum la periodo de Helpe al Koreio en Batalo kontraŭ la Usonaj Agresantoj. Ili estis rektaj partoprenantoj de la Patrolanda Liberiga Milito de Koreio kaj formis profundan fratecon kun la korea popolo. Kiam la aeroplano de la delegacio alproksimiĝis super la rivero Jalu, vigliĝis la kajuto. "Vidu, Jalu-rivero!" "Jalu-rivero!" Antaŭ 17 jaroj, pro freneza bombardado de la usonaj agresantoj multaj lokoj de Koreio fariĝis bombokavoj kaj ruinoj. Sed nun, rigardante la teron de Koreio el la aeroplano, oni vidis: Sur la kampoj estas verdaj ombraĵoj kaj ordaj vicoj de rizogarboj, ambaŭflanke de ŝoseoj viciĝas novaj loĝejoj, traktoroj faras aŭtunan plugadon sur kampoj kaj grupoj da aŭtoj galopas sur ŝoseoj. Ĉiuj membroj de la delegacio sentis ĝojon pro la atingoj de la korea popolo en ĝia konstruado dum la lastaj 17 jaroj.


En la amikeca tagdeko, por solene memorigi la eniron de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio, grandiozaj mitingoj okazis ne nur en la ĉefurbo de la respubliko Pjongjango, sed ankaŭ en Kaesong sur la fronta pozicio kontraŭ la kliko de Usono — Pak Ĝen Hi, en Sinuĝu, Kange kaj Hiesan tuj apud nia lando trans la rivero Jalu, en industria urbo Ĉonggin ĉe la orienta marbordo kaj en grava urbo Sarivon en la okcidenta parto. La mitingoj estis saturitaj de la atmosfero de batala amikeco kaj revolucia unuiĝo de la korea kaj ĉina popoloj kune dividantaj la saman sorton de vivo kaj morto.

Dum sia restado en Koreio, la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo ricevis ekstreme varman bonvenigon kaj intiman akcepton de la Korea Labora Partio, la registaro, la popola armeo kaj amasoj de diversaj socitavoloj kaj ĉiam vivis, de la komenco ĝis la fino, en atmosfero de amikeco kaj solidareco.

En la dua tago post kiam la delegacio atingis Koreion, la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen akceptis ĉiujn membrojn de la delegacio kaj faris kun ili longan intiman kaj amikecan interparolon. Ĉe la adiaŭo, firme premante la manon de la delegacia estro Zeng Siju, Ĉefministro Kim Il Sen petis lin transdoni al Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin, la Komunista Partio de Ĉinio, la registaro, la armeo kaj la popolo de Ĉinio entuziasman saluton kaj altan respekton de li mem kaj de la Korea Labora Partio, la registaro, la armeo kaj la popolo de Koreio. Tiu ĉi neforgesebla akcepto donis profundan impreson al la membroj de la delegacio.

Dum la vizitado, la delegacio ĉie ricevis varman bonvenigon kaj solenan akcepton de la lokaj

Cent kelkdek mil popolanoj de Sarivon solene kunvenis por varme celebri la 20-an






Kamarado Kim Il Sen, la granda gvidanto de la korea popolo kaj ĉefministro de la kabineto de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio akceptis, je la 24-a de oktobro, 1970, ĉiujn membrojn de la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo kun kamarado Zeng Siju kiel la estro kaj kamarado Ĉen Hiansuj kiel la vicestro.

laborantaj amasoj kaj oficiroj kaj soldatoj de la popola armeo, kio plene manifestis la profundan amon de la frata korea popolo al la ĉina popolo. Kiam la delegacio iris al Sarivon, ĝi ricevis bonvenigon de cent kaj kelkdek mil homoj ambaŭflanke de la vojo de la antaŭurbo ĝis la urbocentro. Inter ili troviĝis partiaj kaj registaraj gvidantoj de provinco kaj urbo, onkloj venintaj de lokoj kelkdek liojn foraj malgraŭ pluvo, knaboj kun ruĝaj kravatoj de aliaj regionoj kaj antaŭaj kunbatalantoj de la

Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Ili portis plej bonajn festajn vestojn kaj tenis florbukedojn kaj naciajn standardojn de ambaŭ landoj. Ili tamburadis kaj tamtamadis, hurais kaj saltis, kaj la tuta urbo dronis en ĝojega festa atmosfero. Kiam la aŭtoj de la delegacio trapasis la vojon, la bonvenigantaj amasoj ambaŭflanke de la vojo aklamadis kaj dancadis, ĝojkriante "Amikecon" kaj "Vivu" kaj ŝutis buntajn petalojn sur la ĉinajn gastojn. Oni ofte vidis, ke alproksimiĝas grizharaj avinoj dancante kaj

datrevenon de la eniro de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj en la militon en Koreio.



kantante kaj en iliaj okuloj brilas larmoj de ĝojo. La kamaradoj de la delegacio neniel povis reteni sin de emociiĝo kaj senĉese svingadis la florbukedojn en siaj manoj, kaj iuj el ili simple descendis la aŭtojn, donacis la florbukedojn al koreaj fratoj kaj ĉirkaŭpremis kun koreaj kunbatalantoj. Sennombraj koloraj rubandoj simbolas la interligon de la koroj de la ĉina kaj korea popoloj kaj sennombraj bukadoj manifestas la profundan amikecon inter la du popoloj de Koreio kaj Ĉinio.

Post alveno al Koreio, la batala heroo Jang Jucaj de la antaŭaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj, vicestro de la fama rekognoska plotono kiu surprize atakis la Blanktigran Regimenton, tuj klopodis serĉi avinon Ĉoj kiu savis lin. Iufoje en la milito en Koreio, Jang Jucaj rekognoskis en montaro de orienta linio kaj renkontis neĝan uraganon. La temperaturo abrupte falis kaj pro malvarmego kaj malsato li svenis en neĝo. Lin trovinte la avino Ĉoj

tuj subapogante helpis lin iri en ŝian domon, kovris lin per vatita litkovrilo kaj trinkigis al li varman akvon. Dank' al la flegado de la avino reboniĝis lia farto.

Post alveno al Hecan, kamaradino Sun Ĝijuan, membro de la Trupo de Literatura kaj Arta Laboro de la antaŭaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj, diris gaje, ke ŝi venis al sia hejmo, ke tie estas ŝia dua hejmloko. Ŝi estis aktorineto kiu vivis tie de la 15-jara ĝis la 22-jara aĝo kaj ŝi havas apartan senton al la tieaj montoj, riveroj, herboj kaj arboj.

Inter la sennombraj emociaj aferoj dum la intervidiĝo de la ĉinaj kaj koreaj fratoj, plej emocia estas la intervidiĝo de Luo Diekaj, la patro de martiro Luo Ŝenggiaŭ de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kun la familio de Ĉoj Jin, oficiro de la Korea Popola Armeo. En la tagmezo de la 23-a de oktobro, akirinte forpermeson, Ĉoj Jin frue venis al la

Je vizito al trupo de la Korea Popola Armeo, la Amika Delegacio de la Ĉina Popolo estis varme bonvenigata de ĝiaj oficiroj kaj soldatoj ĉe ambaŭ flankoj de la vojo.





La Amika Delegacio de la Ĉina Popolo vizitas Mangengdaj, la hejmlokon de la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen.

aerodromo de Pjongjango. Kiam la avo Luo Diekaj descendis aeroplanon, Ĉoj Jin sage alrapidis kaj sin ĵetis en lian sinon kriante “paĉjo” kun varmaj larmoj en la okuloj kaj doloro kaj ĝojo en la koro, povante diri nenion plue.

De tiam, Ĉoj Jin ofte subapogis Luo Diekaj kaj tre zorgis lin, kvazaŭ filo patron kiuj rekuniĝis post longa disiĝo.

En la 26-a, kiam Luo Diekaj venis al la hejmloko de Ĉoj Jin. Ĉoj Jin kaj lia patrino jam atendis ekster la vilaĝo por bonvenigo. Ili ĉirkaŭpremis unu la alian kaj ĉiuj larmis de emocio. Kaj poste, Ĉoj Jun, la frato de Ĉoj Jin kaj iu alia junulo levis Luo Diekaj kaj lante trairis la homamasojn bonvenigantajn ambaŭflanke de la vojo.

Luo Diekaj prezentis girlandon al la tombo de martiro Luo Ŝenggiaŭ kaj poste venis al la hejmo de Ĉoj Jin. Kiam la edzino de Ĉoj Jin alkondukis infanojn kaj diris, ke ili estas infanoj de Ĉoj Jin kaj ankaŭ genepoj de Luo Diekaj, la avo altiris al si la infanojn kaj ridis serene. Li diris: “Mi tre ĝojas!” “Mi tre ĝojas!”

Ĉe la adiaŭo, la maljuna Luo Diekaj diris al Ĉoj Jin, ke li aŭskultu Ĉefministron Kim Il Sen, estu bona batalanto de la popola armeo kaj plenumu la taskon batali kontraŭ la usona imperiismo kaj defendi la Patrion. Ĉoj Jin tuj respondis: “Mi nepre gravuros la vortojn de paĉjo en la koron kaj servos kiel bona batalanto fidela al la gvidanto. Se la usona imperiismo aŭdacos fari agresan militon, mi nepre batalos brave por defendi la Patrion kaj ekstermos ĉiujn agresantojn!” Luo Diekaj foje kaj refecje brakumis la kvar infanojn de Ĉoj Jin kaj admonis ilin diligente lerni por servi al sia Patrio.

La memoriga aktivado kaj amika vizito skribis novan paĝon al la brila historio de amikeco inter Koreio kaj Ĉinio. La ĉinaj kaj koreaj kunbatalantoj ne nur retrorigardis la batalan amikecon kaj grandan unuiĝon formitajn en la historio, sed ankaŭ pliapaŝe fortikigis kaj disvolvis la amikecon inter ambaŭ landoj, plifirmigis la decidon batali kune kontraŭ la usona imperiismo kaj japana militarismo. Venko certe apartenos al la popoloj de Ĉinio kaj Koreio.

Profunda Batala Amikeco



Luo Diekaj (la maldekstra) kaj Ĉoj Jin

ĈINIO kaj Koreio estas frataj najbaraj landoj interligitaj per montoj kaj riveroj, kaj interdependantaj kiel lipoj kaj dentoj. La ĉina kaj korea popoloj fondis profundan batalan amikecon per sango en la bataloj kontraŭ la komunaj malamikoj — la japana imperiismo kaj la usona imperiismo.

Je la 25-a de oktobro de 1950, observante la saĝan decidon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ helpi Koreion en batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj defendi la patrolandon, la ĉina popolo sendis siajn eminentajn gefilojn — la Ĉinajn Popolajn Volontulojn al Koreio por batali kune kun la korea popolo. Post sanga batalo de 3 jaroj, la korea kaj ĉina popoloj fiaskigis la ferocegajn usonajn agresantojn kaj iliajn komplicojn, kaj tiel starigis al la aziaj kaj mondaj popoloj brilan ekzemplon de unuiĝo kaj batalo por venki la usonajn agresantojn kaj iliajn lakeojn.

Mia filo Luo Ŝenggiaŭ estis unu el la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Sur la korea batalejo, li ligis sian koron kun tiu de la koreaj armeo kaj popolo kaj koncentris sian malamon al la usona imperiismo. Li heroe ĵuris jene: “Se mi estos trafita de kuglo de agresanto, ne haltu antaŭ mia kadavro; vi devas daŭre antaŭenmarŝi kuraĝe kaj venĝi milojn kaj milojn da koreaj popolanoj kaj martiriĝintaj kamaradoj!” Li starigis profundan batalan amikecon kun la korea popolo. Je la 2-a de januaro, 1952, li brave oferis sian vivon por savi korean knabon Ĉoj Jin. Li faris nur kion devis fari batalanto de ĈPV. La korea popolo tamen donis al li altan gloron kaj skribis lian nomon en la heroan historion de unuiĝo kaj batalo de la korea kaj ĉina popoloj. Tio sentigas al mi senkomparan emocion kaj senkomparan gloron.

En 1953, kiel membro de la Saluta Delegacio de la Ĉina Popolo, mi vizitis Koreion kaj ricevis koran aŭdiencon de kamarado Kim Il Sen, la granda gvidanto de la korea popolo kaj intima kunbatalanto de la ĉina popolo, kaj varman bonvenigon de la frata korea popolo. La scenoj de batala amikeco ankoraŭ restas freŝaj en mia memoro. Dum la du monatoj en Koreio, mi baniĝis en intima kaj frata batalamikeco. Kien ajn nia delegacio iris, tie la koreaj popolanoj bonvenigis nin tamtamente kaj tamburante, kantante kaj dancante. La fame konata korea internaciisma batalanto Pak Ĝej Ken iam ŝirmis vunditon de ĈPV per sia

korpo kontraŭ obuso de la malamikoj kaj tiel oferis sian vivon. Lia edzino donacis al mi siajn vestojn kaj ornamaĵojn portatajn en ilia geedziĝa festo. Kiam ni eniris kazernojn de la Korea Popola Armeo, la KPA-anoj kvazaŭ vidis siajn karulojn, kun larmo ili forte premis mian manon kaj senĉese kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ Zedong!" "Vivu Marŝalo Kim Il Sen!" Kiam ni venis al la hejmloko de Ĉoj Jin — Sakcan-ri de Suncun-gun de Koreio, la tuta vilaĝo bolis de ĝojo, ĉiuj vilaĝanoj konkure manpremis kaj brakumis kun mi. Ĉoj Jin kaj membroj de la Sturma Grupo Luo Ŝenggiaŭ iris pli ol unu lion alte portante min. Enirinte la vilaĝon, ili elprenis siajn plej bonajn manĝaĵojn por nin regali. Tiun nokton, mi dormis kune kun Ĉoj Jin kaj lia patro sur unu sama terlito kaj babilis ĝis noktomezo. La vilaĝanoj ankaŭ akompanis min viziti la tombejon de martiro Luo Ŝenggiaŭ sur la monto Luo Ŝenggiaŭ apud la rivero Luo Ŝenggiaŭ, kaj mangeste ili esprimis sian decidon nepre venki ĝisfunde la usonajn agresantojn. Kvankam ni kaj la koreaj popolanoj havas malsamajn lingvojn, tamen la komuna celo venki la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn kaj la profunda amikeco formita en la bataloj strikte kunligas niajn korojn. Multaj vivecaj ekzemploj sur la korea batalejo montris: La ĉina kaj korea popoloj estas intimaj kunbatalantoj kaj fratoj kun rilato de sango kaj karno kaj kun komuna sorto.

En 1954, la korea popolo sendis sian delegacion por viziti nian landon, ĝi venis ankaŭ al mia hejmloko — Hinhua-gubernio de Hunan-provinco por viziti mian familion. Mi neniam forgesos la profundan amikecon de la korea popolo al mia familio.

En aŭgusto de 1970, dum sia vizito al Ĉinio, la Korea Tablotenisa Teamo intervidiĝis kun mi ĉe Ĉangŝa de Hunan. Kun emociaj larmoj ili manpremis kun mi dirante: "Vidante vin, ni sentas kvazaŭ ni vidus karulon." Mi profunde sentis, ke neniŭ povas detrui la plej sinceran batalan amikecon inter la ĉina kaj korea popoloj formitan el sango en la longdaŭraj bataloj kontraŭ la japana imperiismo kaj la usona imperiismo.

En la pasintaj 20 jaroj, la usona imperiismo ne prenis la lecionon el la malvenko en la korea milito. Hodiaŭ ĝi ankoraŭ obstine okupas tirane la sudan Koreion kaj nian teritorion Tajvan-provincon, freneze disvastigas agresan militon en Hindaĉinio kaj aliaj partoj de la mondo. Samtempe intensigante sian koluzion kun la japana reaktiularo, ĝi bredas la reviviĝantan japanan militarismon kiel sian "azian ĝendarmon" por plenumi la "novan azian politikon" "batali kontraŭ azianoj per azianoj". Tion absolute ne permesas la ĉina kaj korea popoloj. Firme observante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn", la ĉina popolo hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio batalos ĝis la fino unuanime kun la frata korea popolo por venki la usonan imperiismon kaj ĉiujn ĝiajn lakeojn!

Eterne vivu la batala amikeco inter la ĉina kaj korea popoloj formita el sango!

**La verkinto de tiu ĉi artikolo Luo Diekaj estas patro de la internaciisma batalanto Luo Ŝenggiaŭ kaj nun vicestro de la Revolucia Komitato de Hinhua-gubernio de Hunan-provinco.*



ŜARĜEBLA ELEKTRA TORĈO

La laboristaj amasoj de Kantona Fabriko de Elektraj Torĉoj sukcesis fari ŝargeblan elektran torĉon.

Tia torĉo enhavas hermetikan malgrandan pilon, silician rektifilon, metalan kondensilon

k.a. Post malŝarĝo oni povas reŝargi la elektran torĉon, kontaktante ĝin kun elektra fonto de 220-volta ordinara alterna kurento por lumigado. Tia elektra torĉo konsumas elektron tre malmulte. Ĉirkaŭ 300 fojoj de ŝarĝo konsumas nur unu kilovathoron da elektro. La lumiga efiko de unufoja ŝarĝo povas superi tiun de paro da sekaj piloj de n-ro 5.

La ŝargebla elektra torĉo estas farita el ordinara plasto; dank' al tio oni povas ŝpari metalon por la ŝtato.

Antaŭenmarŝas la Heroa Jan-an-a Popolo

LA heroa jan-an-a popolo marŝas antaŭen! En la plej malfacilaj jaroj de la ĉina revolucio, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la jan-an-anoj faris senmortajn meritojn en la liberiga afero de la ĉina popolo, oferinte santon kaj vivon. Hodiaŭ, disvolvante la jan-an-an spiriton, kun alta batalvolo la heroaj gefiloj de Jan-an faras novajn kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

La jan-an-a popolo senlime amas nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. La brila figuro de Prezidanto Maŭ, la granda voĉo de Prezidanto Maŭ, la kora zorgo kaj senlaca instruo de Prezidanto Maŭ por ĉiam gravuriĝos en la koro de la jan-an-a popolo. La granda revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ dum 13 jaroj en Jan-an kaj la jan-an-a spirito persone kulturita de Prezidanto Maŭ ĉiam estas plej profunda instruo kaj plej granda kuraĝigo al la jan-an-a popolo!

PENEMA LUKTO EN MALFACILOJ

Ĉiam sin stimulantante per la instruoj de Prezidanto Maŭ pri **sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj**, la jan-an-anoj senĉese faras kontribuojn por la popolo. Tia estas He Ĝenfa, sekretario de la partia filio de Ligiagoŭ-brigado de Juanlongsi-komunumo de Jan-an-gubernio.

He Ĝenfa naskiĝis en malriĉkampana familio de montregiono de norda Ŝenhi-provinco. Li aliĝis al la Partio en 1935 kaj al la Ĉina Laborist-Kampana Ruĝa Armeo en 1936. Li partoprenis batalojn kontraŭ lokaj tiranoj kaj por dividi kampojn de bienuloj. En la malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito li kaj kulturis milionojn kaj tenis fusilon. Ekde 1940, li fariĝis gardbatalanto de Prezidanto Maŭ, patrolis en Janggialing loĝata de Prezidanto Maŭ, gardstaris ĉe deklivo de Zaŭ-juan, dufoje starigis meritojn kaj dekfoje elektiĝis kiel avangarda modelo. Post la Liberiĝo en 1949,

He Ĝenfa venis al Pekino sekvante Prezidanton Maŭ. En 1957, konsiderante lian sanstaton la partia organizo decidis demobilizi lin al loka institucio. Vidante la alvenon de la alta tajdo de socialisma transformado en la kamparo, kun plena revolucia fervoro li firme petis permeson, ke li revenu al la kamparo de norda Ŝenhi. Tie li denove ekprenis la pioĉon, hakis montojn kaj alkondukis akvon por transformi la naturon kune kun la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

Sub la gvido de He Ĝenfa, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ligiagoŭ-brigado rapide turnis sian brigadon fame konatan pro malriĉeco en la tuta komunumo en progresintan brigadon kun plenarypleksa disvolviĝo de agrikulturo, forstado, paŝtado kaj flankokupo. Prenante sur sin la oficon de la sekretario de la partia filio de la brigado, li ĉiam partoprenas kolektivajn produktajn laborojn kaj vivas kiel ordinara laborulo inter la amasoj, dividante dolĉon kaj maldolĉon kun la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Sur muron de sia domo li pendigis la instruon de Prezidanto Maŭ **“Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro”**, ĉiutage ĝin legas, ĉiam pensas pri ĝia senco, kaj rigardas sian memkonscian partoprenon de produkta laboro kiel bezonon de la revolucio kaj fundamentan rimedon por preventi kaj opozicii reviziismon. Kiam li iras al la gubernio por kunvenado, li ĉiam portas kun si kanabon kaj faras ŝnurojn por la brigado dum aliaj ripozas.

En la socialisma revolucia konkursa movado vige iranta en la kamparo de Jan-an por disvolvi la jan-an-an spiriton, He Ĝenfa estas pli plena de freŝa energio, kune kun la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton.



Malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Heĝuangping-komunumo de Jan-an-gubernio studas instrukcion de Prezidanto Maŭ donitan en oktobro de 1949 al gekamaradoj en Jan-an.

Ili havas komunan ĵuron: “La jan-an-a popolo ĉiam devas gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”


MODESTO KAJ PRUDENTO

“Ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, prudentaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de malluksa vivado kaj penema lukto.” Firme tenante la intiman instruon de Prezidanto Maŭ en la koro kaj havante la grandan idealon de komunismo, la jan-an-a popolo rigore postulas de si mem kaj ĉiam marŝas antaŭen.

En Ĝanggiahe-komunumo de Janĉuan-gubernio troviĝas montvilaĝo Hinŝenggu. Alte tenante revolucionan ruĝan flagon, Lu Hjucejaj, maljuna malriĉkamarano de tiu vilaĝo, kiu aliĝis al la Partio en 1935, persistis ĉe la plejfronto de la Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a Limregiono kaj partoprenis bravan batalon por persone defendi la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Sub la edifo de Lu Hjucejaj, ĉiu el nur naŭ familioj de tiu malgranda vilaĝo en la tridekaj jaroj sendis parencon al la fronto. Tie, ĉiu el la virinoj, maljunuloj kaj knaboj sendis impostan

grenon aŭ faris ŝuojn al armeanoj aŭ gardstaris por subteni la liberigan aferon de la tutlanda popolo.

Hodiaŭ, sur la larĝa vojo de daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo, Lu Hjucejaj, kiu partoprenis la kampanjon de Pinghinguan-pasejo persone direktita de Vicprezidanto Lin, ankoraŭ dediĉas sian forton en la revolucio kaj produkto de Hinŝenggu-brigado. Ankaŭ lia edzino estas maljuna partiano kun membraĝo de 35 jaroj kaj modelo en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ŝi nun estas aktivulino en diversaj laboroj de la brigado. Lia plej aĝa filo Lu Hionglu estas sekretario de la partia filio kaj estro de la revolucia komitato de la brigado. La plej juna filo Lu Hiongpeng estas ano de progresinta kolektivo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso de la brigado. En ilia familio estas ok kompartianoj kaj tri membroj de la Komunisma Junulara Ligo. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la tuta familio persistis en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ, periode funkciigis hejman studrondon de Maŭzedongpenso kaj disvolvis kritikon kaj memkritikon, tiel ke ĉiuj estas sturmantoj en la revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Lu Hjucejaj,



Vivecplenaj junulinoj de Jan-an

kiu jam atingis la aĝon de 66 jaroj en 1970, ĉiutage laboras sur kampo kune kun gejunuloj. Iutempe oni konsilis al li fari relative malpezan laboron, li ĉiam diris firme: “Vi pripensu en mia loko, kiel mi povus preferi la malpezan ŝarĝon, estante veterana partiano kulturita kaj edukita de Prezidanto Maŭ pli ol 30 jarojn!”

Lu Hionglu, sekretario de la partia filio kaj estro de la revolucia komitato de la brigado, estas kvankam juna, tamen havas klaran direkton kaj plenas je energio kaj entuziasmo. Li ĉie donas bonan ekzemplon en tenado de revolucio kaj stimulado de produkto, agas pionire en ĉiu laboro, estis glore elektita kiel reprezentanto de la Naŭa Kongreso de la Partio en 1969 kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ.

Hinŝenggu estis antaŭe montvilaĝo kun naturaj kondiĉoj tre malfavoraj. Sub la gvido de la Partio, la familio de Lu Hjucejaj kaj komunumanoj de la brigado kune batalis kontraŭ la naturo kaj dediĉis sian tutan forton por turni la postrestintan fizi-

onomion de sia malriĉa montvilaĝo. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, la pomua produktokvanto de Hinŝenggu-brigado kreskis 1.5-oble. Kaj tiu brigado elektiĝis kiel avangarda unuo de Ŝenhi-provinco en lernado de Daĝaj en agrikulturo.

Antaŭ la atingo kaj honoro, Lu Hiongpeng, la plej juna filo de Lu Hjucejaj, montris memkontentigon. Li opiniis, ke la patro pasinte havis meritojn en la militoj kaj nun faras novajn kontribuojn, lia frato estas bona gvidanto de la brigado, dum li kvankam juna, faris ankaŭ multan penadon en jungado de montoj kaj akvoj. Tial, li diris foje: “La kontribuo de nia familio al la kolektivo ne sufiĉas?” Tion aŭdinte, la patro maldormis tra la nokto. Li profunde komprenis, ke la memkontentiĝo de la filo je la atingoj estas obstaklo por daŭra revoluciado. Li do konsiliĝis kun Hionglu pri tuja funkciigo de hejma studrondo de Maŭzedongpenso. En kunsido, Lu Hjucejaj kaj ĉiuj familianoj studis koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ elmetitajn en la *Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*, la novan statuton de la Partio, kaj poste ligante tion kun sia propra travivaĵo li rakontis pri la heroa batalado de la tutlanda popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ por renversi imperismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon. Li diris emocie: “Prezidanto Maŭ instruas al ni: **‘Eĉ se ni gajnis gigantan sukceson en nia laboro, ankaŭ ne estas ia ajn kialo por fieri kaj aroganti.’** Komunismaj batalantoj devas ĝisfunde batali por liberigo de la homaro, kaj la revolucia vojo restas ankoraŭ longa!” Lia edzino diris ankaŭ al sia filo: “Infano mia! Kial vi ne pensas pri la instruo de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado gajninte la atingon kaj honoron? Ni ne devas vidi nur hodiaŭon, sed ankaŭ morgaŭon!”... Sub la helpo de siaj familianoj Lu Hiongpeng serioze faris memkritikon.

DAŬRIGI LA BATALON

Dank’ al nutrado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, la nova generacio de la jan-an-a regiono postsekvas la spurojn de la malnova generacio kaj daŭrigas la revolucian aferon de la revoluciaj antaŭuloj. En Ĝiluo-vilaĝo, kie la granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone komandis la faman Ĝiluo-kampanjon, troviĝas vigloplena junulo, kiu nun estas sekretario de la partia filio de Ĝiluo-brigado. Lia nomo estas Li Ŝuanhu.

Li Ginhiang, la patro de Li Ŝuanhu, estis la unua filia sekretario de KPĈ en Ĝiluo-vilaĝo. Li heroe oferis sian vivon en la revolucia milito. Antaŭ ok jaroj, Li Ŝuanhu revenis de lernejo al sia hejmloko por partopreni la kolektivan produktan laboron, kaj hardis sin en komuniston kun konscio de proletara avangarda elemento en la ŝtormo de la klasa batalo.

En printempo de 1969, Li Ŝuanhu estis elektita kiel sekretario de la partia filio de la brigado. Multaj maljunaj kompartianoj diris al li kore: "Ŝuanhu, via patro estis nia unua sekretario de la partia filio. Li revoluciis strikte sekvante Prezidanton Maŭ kaj verŝis sian lastan guton de sango por la liberiga afero de la ĉina popolo. Hodiaŭ, la ruĝan standardon de nia Ĝiluo-brigado vi portu. Same kiel via patro, vi devas por ĉiam esti fidela al Prezidanto Maŭ kaj revolucii ĝis la fino!"

La sekvintan tagon de kiam Li Ŝuanhu elektiĝis kiel la sekretario de la partia filio, li venis al la montkapo kie Prezidanto Maŭ tiutempe komandis la Ruĝan Armeon en milito; antaŭ la maŭzoleo de revoluciaj martiroj glorie oferintaj sian vivon en la kampanjo, li solene ĵuris: "Mi marŝos ĉiam antaŭen firme laŭ la vojo surverŝita de la sango de revoluciaj antaŭuloj kaj kondukos la revolucion sub la proletara diktaturo ĝis la fino!"

En la laboro, Li Ŝuanhu ĉiam metas la vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso sur la unuan lokon antaŭ ĉiuj laboroj, armas sin kaj edukas la amasojn per la teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo, tiel ke la revolucio kaj produkto de la brigado iras vigloplene.

LA VOJO DE NANNIVAN

En la vasta kamparo de la jan-an-a regiono, kelkdek mil pekinaj intelektaj gejunuloj venintaj de apud Prezidanto Maŭ rapide kreskas sub flegado de la jan-an-a spirito. Ili fiksloĝiĝis en produktaj brigadoj ĉe Zauĵuan, Janggialing, Nannivan, Ĝiluoĝen, Vajaŭbaŭ kaj aliaj lokoj, kie Prezidanto Maŭ persone faris brilan revolucionan praktikon, kaj ricevis reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, tial al ilia spirita fizionomio okazis profunda ŝanĝiĝo kaj la amasoj honore nomas ilin kiel novajn komunumanojn de Jan-an.

En Nannivan estas grupo de pekinaj intelektaj gejunuloj fiksloĝiĝintaj en brigado. En januaro de 1969 la naŭ gejunuloj de la grupo venis al Nan-

nivan en ĉielkovra neĝblovo de la montregiono de norda Ŝenhi.

Post kiam ili atingis Nannivan, la tieaj maljunaj malriĉkamparanoj, ruĝarmeanoj, ruĝgvardianoj, kaj partianoj donis al ili lecionon de la revolucia tradicio de penema lukto en malfaciloj. En la kaverna domo kie iam loĝis Prezidanto Maŭ dum sia inspektado al Nannivan, kaj sur teraskampoj kulturebligataj de la batalantoj de la 359-a brigado de la Okavoja Armeo, la nannivan-a popolo rakontis al ili pri kortuŝaj scenoj, kiel Prezidanto Maŭ persone direktis la grandan produktan movadon de Nannivan kaj kiel la maljuna generacio de revoluciuloj pene ekspluatadis Nannivan. 73-jara ruĝarmeano Liu Baŭĝaj gvidis tiujn gejunulojn por pririgardi monumenton de revoluciaj martiroj majeste starantan ĉe Giulongkjuan. Liu Baŭĝaj kaj la gejunuloj kune staris antaŭ la monumento kaj legis frazon post frazo la epitafon tiutempe skribitan de Prezidanto Maŭ por la martiroj: "Ami la popolon, sincere servi al ĝi kaj dediĉi ĉiujn fortojn ĝis la lasta spiro." Liu Baŭĝaj rakontis pri meritoplenaj heroaĵoj de la martiroj kiuj peneme luktis en malfaciloj kaj brave oferis sian vivon pro la revolucio, kaj konkludis emocie: "Vojhakintoj tiutempe timis nenian malfacilon, do la vojirantoj hodiaŭ des pli ne devas timi malfacilojn!"

Grandaj revoluciaj scenoj kaj brilaj revoluciaj figuroj unu post alia kuraĝigis kaj stimulis la intelektajn gejunulojn el Pekino brave marŝi antaŭen sur la vojo de revoluciigo. Kiam ili faras akran batalon kontraŭ plenmano da klasaj malamikoj, kiam ili truigas ŝtonojn sur danĝeraj deklivoj kaj eksplodigas montajn krutaĵojn per dinamito por krei teraskampojn, kiam ili batalas kontraŭ egoismaj konsideroj en sia cerbo, la eduko de la nannivan-a popolo donas al ili neelĉerpeblajn kuraĝon kaj forton.

20-jara junulino Luo Jan-gjun estas la grupestro. Ŝi organizis la grupanojn por persisti en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj gvidis ilin en memkonscia akcepto de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la klasa batalo ŝi sturmis antaŭ aliaj; en la produktado ŝi pene kaj diligente laboregis; en la ideologia remuldo ŝi estas rigora al si mem kaj donis ekzemplon en batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo. Parolante pri ŝi nannivan-anoj ĉiuj diris starigante la dikfingron: "Luo Jan-gjun ja estas bona ruĝgvardiano de Prezidanto Maŭ!"

Por serĉi perditan bovon de la brigado, grupano Fan Ĝong senprokraste en la nokto iris palpe en densan arbaron kaj sur krutaĵojn de monto ĉe Nannivan. Li falis foje kaj foje, liaj vestoj ŝiriĝis de dornoj kaj liaj manoj kaj piedoj vundiĝis de akraj ŝtonoj, sed li sin levis post ĉiu falo, daŭre palpis antaŭen inter krutaĵoj kaj fine trovis kaj kondukis la bovon al vilaĝo. Kiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj lin laŭdis, li diris: “Mi faris ankoraŭ malmulte kompare kun revoluciaj antaŭuloj!”

Ĉen Ginbaŭ iris en neĝblovo sur monton por haki brullignon. Lia kapo estis vundita de disfluganta lignopeco kaj senĉese sangis. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konsilis al li ripozon. Post bandaĝo de la vundo li daŭrigis la batalon dirante: “Por la liberiĝo de la popolo la revoluciaj martiroj ne timis eĉ morton, mia vundeto estas nemenciinda!”

Nurate de la jan-an-a spirito, la naŭ gejunuloj aliĝis al la glora vicaro de la nannivan-a popolo

per siaj praktikaj agoj kaj fariĝis novaj kompetentaj membroj de la popola komunumo Nannivan. La grupo estis elektita kiel avangarda kolektivo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso de la jan-an-a regiono. La grupanoj rigardis la jam akiritajn atingojn kiel novan startpunkton por daŭra revoluciado, decidis pli bone kaj diligente remuldi sian mondkoncepton kaj por ĉiam marŝi antaŭen sur la nannivan-a vojo persone elhakita de Prezidanto Maŭ.

Ekde la tridekaj jaroj, la maljuna generacio de revoluciuloj en la jan-an-a regiono travivis la militajn jarojn kaj venkis milojn da malfaciloj kaj danĝeroj, strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Hodiaŭ, jam kreskas la nova generacio de revoluciaj gejunuloj de Jan-an. Kune kun la maljuna generacio, ili strikte sekvas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj brave marŝas antaŭen por batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando.

Maljuna ruĝarmeano Liu Baŭĝaj rakontas al intelektaj gejunuloj el Pekino, kiel la 359-a Brigado de la Okavoja Armeo ekspluatis la teron de Nannivan dum la Kontraŭjapana Rezistmilito laŭ la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “Eklaboru mem por akiri sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj”, por ke ili konu kaj daŭrigu la revolucionan tradicion.



Nova Fizionomio de Vilaĝo Hin-an

NIA produkta brigado Hin-an situas en la valo inter la montaroj Vuĝi kaj Diaŭluo sur Hajnan-insulo. Ĉi tie dise loĝas 70 mjaŭ-naciaj familioj kun 407 homoj. Antaŭ la Liberiĝo ni multe suferis subpremon kaj ekspluaton de *mjaŭ-vang* kaj *ŝangia* (feŭdaj regantoj super mjaŭ-nacio antaŭ la Liberiĝo), manĝante herbojn kaj vestante nin per arboŝelo en la mizeriga primitiva vivo. En la jaro 1943, kuomintangaj reakciuloj trompe kolektis pli ol 1,000 mjaŭ-nacianojn de nia loko kaj faris senhomecan hekatombon, mortigante ilin per mitraĵoj.

Ruĝas la oriento kaj leviĝas la suno. Prezidanto Maŭ sendis al ni soldatojn-fratojn de la liberiga armeo kaj ili savis nin el fajro. Ili iris en profundajn montojn kaj praarbarojn, traserĉante pli ol 60 montojn kaj per tri jaroj ili malsuprenirigis nin mjaŭ-nacianojn kaj helpis nin rekonstrui hejmen kaj donis la nomon "Hin-an" (nova fiksa loĝejo) al nia vilaĝo.

En la 21 jaroj post la Liberiĝo, kvin malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj el nia malgranda vilaĝo estis invititaj al Pekino kaj tie kun granda feliĉo vidis Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de niaj diversaj nacioj. Ĉiu akcepto fare de Prezidanto Maŭ montris al ni direkton de antaŭenmarŝado kaj donis al ni neelĉerpeblan forton por la batalo kontraŭ klasaj malamikoj kaj batalo kontraŭ la naturo, tiel ke ni akiris venkojn unun post alia kaj faris mirindan ŝanĝon al nia vilaĝo Hin-an.

En 1956, mia patrino Deng Juanjing unuafoje estis invitita al Pekino kaj kun granda feliĉo vidis Prezidanton Maŭ. Ŝi reportis al ni la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri agrikultura kooperigado, kiu direktis nin senŝanceliĝe iri la vojon de kolektivigo.

En 1958, malriĉkampano Ĉen Siĝang iris al Pekino kaj vidis Prezidanton Maŭ. Li reportis al ni la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "**Bona estas la popola komunumo**", kiu direktis nin surpaŝi la larĝan feliĉan vojon de popola komunumo.

En la jaro en kiu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon "**Lerni de Daĝaj**

en agrikulturo", mia frato Li Ĝonghing, la sekretario de la partia filio de nia brigado, estis invitita al Pekino, vidis Prezidanton Maŭ kaj reportis al ni la direkton montritan de Prezidanto Maŭ. Sub la gvido de mi kaj la vicsekretario de la partia filio, la virinoj kaj junaj milicanoj respondis la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ per konkreta ago. Ni decidis transformi la facile inundeblan malaltan kampon kun duono de la tuta areo de niaj agroj. Ni fosis ĉirkaŭ la kampo kanaleton 2 metrojn profundan, pli ol 1 metron larĝan kaj pli ol 1,000 metrojn longan, kaj tiel ĝisfunde transformis la malaltan kampon.

Post penema luktado de ses jaroj, ni altigis la totalan grenan produktokvanton de 80,000 ĝis 430,000 ĝinoj. Nun ĉiujare ni vendas al la ŝtato pli ol 100,000 ĝinojn da greno. Kaj samtempe ni kulturis virgan teron, sur kiu ni plantis pli ol 200 muojn da tropikaj ekonomiaj vegetaĵoj, kulturis pli ol 100 muojn da manihoto kaj aliaj por nutri brutojn, kaj dank' al tio ni efektivigis la planon ke ĉiu homo meznombre bredas unu porkon kaj unu bovon; krome ni starigis hidroelektran stacion, lignaĵan fabrikan kaj fabrikan de briko kaj tegolo.

La nuna Hin-an estas tute malsama kun la antaŭa: En la produktado, prenante grenon kiel ĉefĉeneron, ni komplete disvolvas la produkton, science terkulturas kaj akiras stabile riĉan rikolton. Koncerne al la vivo, ni ne plu loĝas en nestoj kaj manĝas kiel sovaĝuloj, ne plu vestas nin per arboŝelo, sed ĉiu loĝas en brika domo kaj en ĉiu domo ni havas elektran lampon kaj radioricevilon; ĉiu produkta grupo havas grenon en rezervo kaj ĉiu familio havas superfluan grenon; en la brigado estas sanitaro kaj en ĉiu produkta grupo aktivas "nudpiedaj kuracistoj". Vidante kun ĝojo la radikalan ŝanĝigon en Hin-an, ni mjaŭ-naciaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diras kun arda emocio: "La brila radio de Maŭzedongpenso lumigas nian mjaŭ-nacian vilaĝon Hin-an!"

*La aŭtoro estas vicestro de la revolucia komitato de la produkta brigado Hin-an de Tajping-komunumo, Kiongĝong-gubernio, Hajnan-insulo.



MAŜINO POR TRANSPLANTI MALGRANDAJN RIZPLANTIDOJN KUNE KUN GRUNDO

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “La fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo”, la Unua Fabriko por Ripari kaj Produkti Agrikulturajn Maŝinojn de Fenghua-gubernio de Ĝegiang-provinco, per siaj propraj fortoj, nove faris maŝinon “Ĝegiang N-ro 1” por transplanti malgrandajn rizplantojn kune kun grundo. Ĝi pezas 24 kilogramojn kaj estas simpla en strukturo, facile fabrikebla kaj oportuna por transporto. Ĝia laborefiko estas 3- ĝis 4-oble pli alta ol tiu de manlaboro, kaj ĝi ne nur povas malpezigi la laborintensecon, sed ankaŭ altigi la labor-kvaliton, kontentigante la postulojn kunporti grundon, sterkon kaj “patrinan” (originan) semon dum transplantado; tio estas avantaĝa por kreskado kaj maturiĝo de plantidoj. Tial, ĝi trovas varman akcepton ĉe la vastaj amasoj.

NILONA FLORDESEGNA CILINDRO

Post ripetada eksperimentado la laboristoj kaj revoluciaj kadroj kaj teknikistoj de Ŝigiaĝuang-a Prestinkturejo de Hebej-provinco sukcesis presi flordeseĝnan ŝtofon per nilona cilindro anstataŭ kupra.

Flordeseĝna cilindro estas grava maŝinparto por presi floraĵojn sur ŝtofon. En la pasinteco en-kaj ekster-lande oni ĉiam faris la cilindron el kupro kun alta pureco produktita per elektroliza metodo. Ĝi estis peza kaj multkosta.

La sukceso de la nilona flordeseĝna cilindro ne nur ŝparas por la ŝtato grandan kvanton da kupro sed ankaŭ multe malpezigis la laborintensecon de laboristoj. Kaj diversaj flordeseĝnajoj presitaj sur ŝtofoj per nilona cilindro tute atingis la normon de tiuj presitaj per kupra cilindro.

JOŬ LAN:

La Ĉinaj kaj Alba Interligiĝas

—Pri la albanaj vira kaj virina

ANTAŬTAGE de nia Nacia Festo de 1970, plene kunportante la profundan amikecon de la albanaj popolo kaj sportistoj al la ĉina popolo, la albanaj vira kaj virina korbopilka teamoj venis al Pekino post longa vojaĝo por fari amikan viziton kaj ĝoje pasigi nian Nacian Feston kune kun niaj popoloj kaj sportistoj.

NI VIDIS PREZIDANTON MAŬ

Nokte de la 28-a de septembro al la hotelo Hinkiaŭ rapidis granda aŭtomobilo en kiu la albanaj gesportistoj de korbopilko bolis de ĝojo. La krioj “Enver — Maŭ Zedong” “Maŭ Zedong — Enver” de tempo al tempo aŭdiĝis el ĝi kaj ŝvebis super la traŭrita vojo.

La albanaj kunbatalantoj dronis en senkompara plezuro. Ĉar en tiu vespero la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun ili. Nun kvankam jam finiĝis la intervidiĝo, tamen ĝia sceno ankoraŭ ŝvebis antaŭ iliaj okuloj. Ili diris: Ke ni povis vidi Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la ĉina popolo, tio estas nia plej granda feliĉo dum la tuta vivo. Ni nepre portos al la patrolando la foton de Prezidanto Maŭ prenitajn kun ni, por ke la albana popolo dividu kun ni la feliĉon. Tuj post sia reveno al la hotelo, la korbopilka sportistino Naime Cuni elprenis sian ŝatatan taglibron kaj skribis en ĝi jenajn vortojn:

“Hodiaŭ sur la tero de la frata Ĉinio mi ricevis akcepton de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj mia sento estas neesprimebla per vortoj. Dum la akceptado Prezidanto Maŭ estis tre afabla kaj familiara, tio plene montras, ke Prezidanto Maŭ interligiĝas kun la tutmonda popolo koron kun koro. Ankoraŭfoje mi deziru eternan vivon al Prezidanto Maŭ!”

Korbopilka sportistoj Vladimir Ĝjinaj kaj Astirit Hutka loĝis en sama ĉambro. Pro forta emocio

naj Kunbatalantoj

Koron kun Koro

korbopilkaĵ teamoj en Pekino

ili ne povis kvietiĝi kaj interbabilis ĝis profunda nokto. Ili diris: Ni vidis Prezidanton Maŭ, la grandan gvidanton de la ĉina popolo, kvazaŭ ni vidus la grandan gvidanton de la albana popolo kamaradon Enver Hoxha; ni amas Prezidanton Maŭ, same kiel kamaradon Enver Hoxha. Ĉar kamarado Enver Hoxha kaj Prezidanto Maŭ estas grandaj marksist-leninistoj kiuj gvidas niajn du popolojn fari pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj la reakciuloj, akiri grandajn venkojn en revoluciaj bataloj, kaj fondis oran revolucion amikecon inter niaj du popoloj. La du popoloj de Albanio kaj Ĉinio nepre devas firme unuiĝi por ĉiam kaj senĉese marŝi antaŭen sur la larĝa vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

“NI VENIS AL NIA PROPRA HEJMO”

Antaŭtagmeze de la 4-a de oktobro, en la Popola

Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio en pekina antaŭurbo, sonis tamtamoj kaj tamburoj kaj ĉie regis gajeco. La komunumanoj ĝojplene iris al vilaĝekstremo por bonvenigi la albanajn kunbatalantojn.

La komunumanoj diris al la albanaj korbopilkaĵ sportistoj: “Ni bonvenigas vin, kvazaŭ niajn proprajn parencojn.” Ankaŭ la albanaj kunbatalantoj diris: “Jes, ni venis kvazaŭ al nia propra hejmo!”

Post veno al la komunumo la albanaj kunbatalantoj tuj partoprenis en produkta laboro kiel ĝiaj ordinaraj membroj. La ĉinaj kaj albanaj kunbatalantoj brako en brako kaj ŝultro ĉe ŝultro iris al la kotonkampo. Liginte sakon ĉe la zonan ili komencis pluki kotonon. Kiam albanaj kunbatalantoj demandis, kion signifas la ĉinaj ideografiaĵoj sur la sakoj, la komunumanoj respondis, ke la skribaĵo signifas “terkulturi por la revolucio”. La komunumanoj diris: Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**”, la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de nia lando firme decidis pliprodukti grenon kaj kotonon kaj subteni la mondan revolucion per praktikaj agoj. La albanaj kunbatalantoj diris: Ankaŭ nia granda gvidanto kamarado Enver Hoxha konstante instruas al ni, ke por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado ni devas “**teni pioĉon en unu mano kaj pafilon en la alia**”. Tio plene montras la samecon de la batalcelo de niaj du popoloj.

Streĉa amika maĉo





Vizito al popola komunumo

LERNI UNU DE LA ALIA POR KUNE LEVI TEKNIKAN NIVELON DE KORBOPILKA LUDO

“Intima amiko trans maro proksimas ja kvazaŭ najbaro.” Kvankam Ĉinio kaj Albanio estas apartigitaj de miloj da montoj kaj dekmiloj da riveroj, tamen niaj koroj estas interligitaj.” Malgraŭ ke la ĉinaj kaj albanaj sportistoj parolas en malsamaj lingvoj, tamen ili estas firme kunligitaj de la komuna revolucia batalo de la du popoloj. En la tagoj de kunestado de la kunbatalantoj de niaj du landoj ĉie montriĝis la revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio. La alveno de la albanaj vira kaj virina korbopilka teamoj al nia lando por fari amikan viziton koincidis kun la jara tutlanda ĉampiona konkurso de korbopilka ludo en Albanio. Tamen la albanaj korbopilka teamoj forlasis la konkurson kaj venis al Ĉinio. Kiam la ĉinaj kaj albanaj kunbatalantoj intervidiĝis sur aerodromo, ili reciproke esprimis la komunan volon kontribui al plifortigo de la amikeco inter Ĉinio kaj Albanio en ĉiuj okazoj tiel en paroloj

kiel en agoj. Ĉu dum vizitado aŭ dum trejnado kaj prezentado de korbopilka ludarto, ili ĉiam zorgis unu la alian kaj rilatis kvazaŭ gefratoj. En la komunaj trejnadoj kaj prezentoj la ĉinaj kaj albanaj sportistoj serioze lernis reciproke la bonajn teknikojn unuj de aliaj. Kiam la albana sportistino Pranvera Dojaka trovis ke la hokmovo de la ĉina sportistino Ĝang Fengki en ĵetado de pilko en korbon tre konformas al ŝi, Ĝang Fengki tuj meminiciate sin turnis al ŝi por klarigi la ĉefajn punktojn de la tekniko kaj doni ekzemplojn. Post dufoja kuna ekzercado P. Dojaka jam ellernis tiun movon. La albana sportistino Naime Cuni bone uzas sian forton de mandiko dum ĵetado de pilko al korbo kaj tiel alta estis ŝia trafoteco, kio ĝuste mankis al la ĉina sportistino Ĉen Hiuŝan. Do Cuni pacience klarigis al ŝi la teknikon tiel ke la lasta plibonigis sian ĵetmovon.

La ĉinaj kaj albanaj kunbatalantoj interligiĝas koron kun koro kaj faris novan kontribuon al la plifortigo de la revolucia amikeco inter la popoloj kaj sportistoj de Ĉinio kaj Albanio.

La Vizito de la Albana

Korbopilka

Teamo al Ĉinio



Svingante siajn brakojn la ĉinaj kaj albanaj korbopilkaĵ sportistoj laŭte krias: “Enver — Maŭ Zedong”, “Maŭ Zedong — Enver”.




Ekskurso al la Granda Muro



La albanaj korbopilkaĵaj sportistoj surkampe laboras kune kun komunumanoj de la Popola Komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio en la antaŭurbo de Pekino, dum sia vizito al ĝi.

La albanaj korbopilkaĵaj sportistoj vizitas fabrikon de duonkondukantaj ekipaĵoj de Pekino.







La korbopilkaĵ sportistoj de Ĉinio kaj Albanio eniras la konkursan halon manon en mano kaj ŝultron ĉe ŝultro



Amika maĉo




Trejnistoj de
ambaŭ landoj

Intima kaj amika interbabilo



La brila ludo gajnis varman aplaŭdon de la spektatoroj.





Ĉina kaj albana sportistoj aprezas albanan albumon.

Naskiĝo de Granda Salminejo en Gianghi

ANTAŬ nelonge, la geologia taĉmento 909 de Gianghi trovis salminejon kun granda enhavokvanto en baseno de ruĝa tertavolo. Per tio, oni finis la historion de sensaleco de Gianghi kaj efektivigis la deziron de ties popolo de multaj generacioj.

Por efektivigi la grandan strategion de Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari

kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, la vastaj amasoj de laborantoj de la geologia taĉmento 909 firme decidis trovi salon en la malnova revolucia bazloko. Sed disputo leviĝis tuj post la elmeto de tiu problemo.

Iuj diris, ke Gianghi najbaras al Fugian kaj Ĝegiang en la oriento kaj intertuŝiĝas kun Guangdong en la sudo, kiuj havas grandan fonton de

Nun finiĝis la historio de sensaleco de Gianghi-provinco.



mara salo, do ne estas necese serĉi salon en tiu provinco.


Aliaj asertis, ke la provinco konsistas ĉefe el malgrandaj basenoj de ruĝa tertavolo kaj ne havas kondiĉojn por formiĝo de salmino.

Ankoraŭ aliaj rimarkigis, ke la tutjara plano de geologia esploro jam estas fiksita kaj estas tro ŝarĝita por ricevi ankoraŭ aldonan taskon, do oni devas iom prokrasti la serĉadon de salmino, eĉ se tio estas necesa. Ĉu oni serĉu salminon aŭ ne? Ĉu oni povos trovi tion? Kiam oni tion faru? Serio da demandoj prezentigis antaŭ la partia komitato kaj la gvidantoj de la revolucia komitato de la geologia taĉmento 909.

Vespere, Veng Ŝenglin, sekretario de la partia komitato kaj estro de la revolucia komitato de la taĉmento, studis verkojn de Prezidanto Maŭ skribitajn en la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito, kune kun la membroj de la revolucia komitato sub sia gvido. Prezidanto Maŭ diris: **“... pro la strikta blokado de la malamiko, ĉiutagaj necesajoj en la regiono sub la sendependa reĝimo de la Limareo, kiel salo, ŝtofo kaj medikamentoj, ĉiam estas tre malabundaj kaj tre karaj. Tio maltrankviligis, iam eĉ ĝis ekstrema grado, la vivon de la amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj etburĝoj, kaj ankaŭ de la soldatoj de la Ruĝa Armeo Sufiĉa solvo de tiuj ĉi ekonomiaj problemoj ja estas atentinda por ĉiu kompartiano.”** Legante la vortojn de Prezidanto Maŭ, ili pensis pri la batalo de la armeo kaj popolo en la malnova soveta regiono kontraŭ la malamiko por akiri salon.

En tiu tempo, la armeo kaj popolo en la malnova revolucia bazloko batalis brave kaj sagace kontraŭ la malamikoj por solvi la problemon de salo: Batalantoj de la Ruĝa Armeo rompis la blokadan linion por akiri salon post la fronto de la malamiko kaj vastaj amasoj sendis salon al la bazloko, spite al vivdanĝero. Iuj el ili kaŝis salon en bambuoj de flosoj kaj reportis ĝin al la bazloko; aliaj sin alivestis ŝtatoficistoj de la malamiko kaj kaŝis salon en palankeno, por trairi la malamikan blokadlinion sub eskorto de grupo da homoj; ankoraŭ aliaj en vatitaj vestoj antaŭe trempitaj en salakvo revenis al la bazloko kaj poste elsolvis la salon. Nemalmultaj kamaradoj oferis sian karan vivon dum la batalo por akiri salon.

La ripetada admono de Prezidanto Maŭ kaj la historio de la heroa batalado de la popolo en la malnova soveta regiono profunde konigis al la membroj de la gvidantaro, kiel grava estas salo por



Membroj de la geologia taĉmento 909 en laboro

la revolucia afero kaj por la vivo de la popolo. Atentinda estas la historia sperto kaj la sangan lecionon oni ne devas forgesi.

Ili iris inter la laboristojn por studi verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun ili kaj petis batalantojn de la antaŭa Ruĝa Armeo, kadrojn de la malnova soveta regiono kaj membrojn de la antaŭa Ruĝa Gvardio rakonti revoluciajn historiojn. Lige kun la aktuala internacia klasbatalo, estis faritaj diskutoj pri la situacio kaj taskoj, kaj multe leviĝis la memfido de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj por serĉi salminon.

La lastaj diris: Prezidanto Maŭ tiel multe zorgis pri la problemo de salo de la armeo kaj popolo en tiu tempo, kiam li sin okupis tre streĉe en direktado de bataloj. Hodiaŭ ni nepre sekvos la instruon de Prezidanto Maŭ kaj trovos salminon en la antaŭa soveta regiono por akiri gloron por Prezi-

danto Maŭ kaj la granda socialisma patrolando eĉ se ni devos trairi ĉiujn montojn kaj valojn!

La salserĉa grupo tuj ekiris al diversaj lokoj por mobilizi la amasojn por serĉi salminon.

Sub la gvido de la partiaj organizoj kaj revoluciaj komitatoj de diversaj niveloj, la geologiaj laborantoj kombiniĝis kun la vastaj amasoj kaj rapide levis potencon amasan movadon por serĉi salon.

Ĝuste kiel Vicprezidanto Lin instrukciis: “Maŭzedongpenso fariĝos neelĉerpebla forto kaj senkompare potenca spirita atombombo, post kiam ĝi estas posedata de la vastaj popolamasoj.” Tiel kadroj kiel amasoj, tiel ruĝgardianetoj kiel blankharaj maljunuloj ĉie fosas salan koton kaj serĉas salan akvon. Informiĝinte pri serĉado de salo, tre ĝojigis iu maljuna malriĉkampano kaj diris al ĉiu renkontato: “Tio ĉi estas alvoko de Prezidanto Maŭ. Ni firme respondas al ĝi!” Li konstante iris tien kaj tien kun bambua ĉapelo sur la kapo kaj sarkilo sur la ŝultro por serĉi terspacon, kiu malsekas matene kaj ekhavas prujnosimilan supraĵon en tagmezo pro sunumo, kaj sub la stimulo de lia ekzemplo, ĉiuj liaj samvilaĝanoj, ĉu junaj aŭ maljunaj, partoprenis la serĉadon kaj baldaŭ trovis kelkajn lokojn salhavajn.

Iu tajloro formetis sian laboraĵon kaj gvidis la saloserĉantajn kamaradojn al iu sala fonto por ĝin esplori.

Aŭskultinte rakonton de sia avo pri la suferoj en la pasinteco pro manko de salo, iu ruĝgardianeto iris de fonto al fonto, de puto al puto por gustumi la akvon, piediris plurajn liojn kun taso da akvo al membro de la salserĉa grupo kaj diris: “Onklo, la akvo estas salgusta. Ekzamenu, ĉu en ĝi estas salo.”

En kelkaj tagoj, popolanoj jam alportis centojn da specimenoj de sala tero kaj sala akvo.

La subteno de la vastaj amasoj multe kuraĝigis la kamaradojn de la salserĉa grupo. Spite al vento kaj pluvo, ili ellitiĝis frue kaj persiste laboris sub steloj por trovi salajn terojn kaj akvon. En mallonga tempo de ses tagoj, ili plenumis taskon, por kies plenumo ili bezonis antaŭe plurajn monatojn. Post laboro en tiu periodo, ili trovis, ke kvankam la baseno estas malgranda, sed en la antikveco ĝia fundo estis tre profunda. Krome, la baseno estis bone enfermita kaj havas kondiĉojn por formi salminon. Ili do difinis tiun punkton kiel salhavan.

Instrui al popolanoj kiel rekoni mineralojn.





La laboristoj interparolas pri siaj komprenaĵoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Komenciĝis la batalo de esploro per profunda borado. La kamaradoj de la naŭa subtaĉmento, kiu respondecis pri tiu tasko, zorge laboris kaj rapide enboris. La gvidantaj kadroj diligentis tage kaj nokte kun ili kaj la teknikaj laborantoj projektis, redaktis notojn kaj faris kemiajn analizojn ĉeloke. Kun la enprofundiĝo de la drilata truo metro post metro, pliaridiĝis la deziro de la homoj al vido de salo.

La pinto de la borilo estis tuj eniĝonta en la salan tavolon. Estis frua mateno. La kamaradoj de la sekvanta deĵoro alvenis antaŭtempe, la kamaradoj finintaj sian deĵoron ne volis foriri, polanoj loĝantaj en la najbareco svarmis ĉirkaŭ la drilmaŝino kaj ĉiuj fiksitis sian rigardon al la borata truo...

“Levu la borstangon!” Je la ordono de la grupestro, oni rapidege levis la borstangon, “Salo! Vere salo!” ĉiuj eksaltis de ĝojo post rigardo de la specimeno prenita el la borstango. “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!” La ĝojkrioj forte skuadis la aeron super la minejo.

La ĝojiga informo disflugis al kampoj kaj foiroj, al la montpiedo de Ginggang-montaro kaj la river-

bordoj de Gangiang. La ĝojaj popolanoj disportis la novaĵon kaj aroj kaj aroj da laboristoj, kadroj, komunumanoj, lernantoj kaj kadroj venintaj al la baza nivelo por partopreni fizikan laboron alrapidis por pririgardi. Iuj blankharaj maljunuloj alvenis de dekoj da lioj por rigardi salon. Tenante la manon de laboristoj, ili diris emocie: “Vi faris grandan bonon, por ke nia amata Prezidanto Maŭ liberiĝu de zorgo. Vi faris bonon por la popolo en la antaŭa soveta regiono, kaj se okazos io en la estonto, ni ne plu suferos pro manko de salo!”

Komenciĝis la kampanjo por esplorado de la salmino!

Rapidega koncentro de kvin drilmaŝinoj estis tre streĉa batalo. Ĉiu maŝino pezas je pli ol dek tunoj kaj ĉiu drilmaŝina turo altas je pli ol dek ĝis pli ol dudek metroj, kaj krome estis ankaŭ aliaj instrumentoj kaj amasego da materialo. Por malmunti kaj transporti tian turon kun la ilaro eĉ de malgranda distanco oni bezonis ĉ. duonmonaton. Kaj nun, oni devis rapide porti la kvin drilmaŝinojn de sur kvin montoj al la salminejo en malproksimeco de 400-500 lioj, kaj krome en plua sezono. Kiel malfacila tasko! La laboristoj laŭte promesis: “Ni garantias veni al la loko en kvar tagoj!”

Ricevinte la ordonon, la kamaradoj de la oka subtaĉmento tuj ekagis. Ili malmuntis la pezan drilmaŝinon kaj la altan turon en torenta pluvo, kaj portis ilin tra la kota montvojo 20 liojn longa.

La kamaradoj de la sepa subtaĉmento venis de profundaj montoj al la ŝoseo en malluma nokto, faris ŝarĝadon sub torĉoj, rapidis al la salminejo, metis siajn pakaĵojn apud la vojon kaj tuj iris munti la drilmaŝinon kaj turon.

Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en la najbaraĵo de la salminejo alrapidis de ĉiuj direktoj, helpis la kamaradojn de la geologia taĉmento en portado de la maŝinoj kaj materialoj, kaj batalis kun ili ŝultron ĉe ŝultro.

En nur kvar tagoj, la pli ol 400 laboristoj kaj teknikistoj jam transportis al la salminejo ĉiujn ekipaĵojn kaj materialojn kun totala pezo de pli ol 100 tunoj kaj ĉiuj drilmaŝinoj tuj komencis labori.

En la tuta kampanjo sur la salminejo, la multe nombraj revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj rompis superstiĉojn, liberigis sian penson, kaj dank' al

konvena elekto de borpunktoj laŭ la konkretaj kondiĉoj de la salminejo, oni reduktis la laborkvanton je 70 procentoj.

Kaj de kiam ili trovis salon en la unua bortruo, ili tuj kombinis la esplorboradon kun la produktado. Ili meminiacie helpis la produktan fakon per livero de materialo, instruo de tekniko, partopreno de projektado kaj kunlaboro en konstruado; ili kune kun la lasta plifirmigis la esploran puton, enpumpis akvon kaj ĝin transformis en produktan puton. Post kuna batalado de 47 tagoj, salakvo ŝprucis el la tero kaj fluis senĉese en la sunumejon kaj tiel produktiĝis pure blanka salo.

La laboristoj sendis plej blankan kaj plej puran salon al Pekino por raporti la ĝojigan informon kaj esprimi la ruĝajn korojn de la popolanoj de la malnova soveta regiono al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili firme decidis teni pli alte la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj disvolvi la revolucian tradicion kaj batalakiri ankoraŭ pli grandan gloron sur la larĝa vojo de daŭra revoluciado!


Salan tavolon trovis la dril-esplora grupo.



Por la Sano de

la Maŭritania Popolo

Ĉina kuracisto kuracas maŭritaniajn pacienton per akupunkturo.



KVANKAM la unuaj membroj de nia kuraca taĉmento al Maŭritanio revenis al la patrolando jam antaŭlonge, mi tamen neniam povas forgesi, kiel la maŭritania popolo bedaŭre adiaŭis nin kaj varme amas la novan Ĉinion kaj nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ.

En la du jaroj dum kiuj ni laboris en Maŭritanio, sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**Servi al la ĉina popolo kaj al la popoloj de la tuta mondo**”, ni venkis malfacilojn kaŭzitajn de varmega klimato, trairis ĉiujn vilaĝojn kaj paŝtejojn de la kvar regionoj Kiffa, Selibaby, Aioun kaj Nema, klopodis preventi kaj kuraci malsanojn por la maŭritania popolo en servo al ĝia sano kaj faris kion ni devis.

270 BLINDULOJ REAKIRIS VIDKAPABLON

“Prezidanto Maŭ sendis al ni bonajn kuracistojn, kaj sen eliro de la hejmo mi blindulo de dek jaroj reakiris vidkapablon. Dankojn al la granda savanto Maŭ Zedong.” Tiel kantis pli ol 50-jaraĝa paŝtisto Mehmud de la vilaĝo Basing de la regiono Nema, post reakiro de vidkapablo.

En decembro de 1969, ni venis al tiu vilaĝo pli ol 200 kilometrojn for de la regiona ĉefurbo. Jam dekelkajn jarojn la maljuna paŝtisto suferis de ektropio de ambaŭ okuloj kaj antaŭ ses jaroj katarakto ekturmentis lin kaj li fariĝis blinda. La arda suno kaj sablovento forte turmentis lin. Lia sola karulo estas la maljuna edzino kiu perdis laborkapablon, tial ili vivis tre mizere kaj ne havis


monon por konsulti kuraciston. Li pensis, ke li restos blinda ĝis sia morto. Sed venis ĉina kuraca taĉmento. La kuracistoj starigis tendojn kaj komencis kuraci por paŝtistoj senpage. Aŭdinte ke venis ĉina kuraca taĉmento, la maljuna! Mehmud petis sian maljunan edzinon konduki lin al la ĉinaj kuracistoj. Li diris al la ĉinaj kuracistoj: “Mi estas blinda, sed ne surda. Mi aŭdis pri Ĉinio kaj Maŭ Zedong. Ĉu vi estas kuracistoj alsenditaj de Maŭ Zedong de Ĉinio?” Kiam ni diris, ke ni estas kuracistoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ por servi al la maŭritania popolo, la maljunulo diris ĝoje: “Kiel bone! Vi certe sukcesos kuraci min, por ke mi blinda maljunulo vidu Prezidanton Maŭ, vidu ĉinojn.”

Kutime, oni devas kuraci katarakton tri monatojn post operacio de ektropio. Por kiel plej eble frue liberigi la maljunan paŝtiston de turmento, ni faris al li du operaciojn en unu fojo. Post sep tagoj, kiam kuracisto forprenis de li la okulŝirmilojn, ĉe ekrigardo li vidis portreton de Prezidanto Maŭ. Premante la manon kaj karesante la kapon al la ĉinaj kuracistoj, li diris: “Dankojn al vi ĉinaj kuracistoj, ke mi revidas lumon. Vivu Prezidanto Maŭ!”

En la du jaroj, sur paŝtejoj kaj en vilaĝoj, la ĉina kuraca taĉmento faris pli ol 460 diversajn operaciojn kaj kuracis pli ol 31,000 pacientojn de okulaj malsanoj kaj 270 blinduloj reakiris vidkapablon dank’ al ilia helpo.

KURACI BRULVUNDITON EN TIES HEJMO

Iun decembran nokton de 1969, al la sanitarĉejo de Selibaby oni alportis nigrulon nomatan Dea Mamoudou, kiu vundiĝis de benzina brulo. La areo de vundo de profunda dua grado okupis 60% de la tuta korpo kaj tiu de malprofunda dua grado okupis 20%. La paciento estis en granda danĝero. La malgranda sanitarĉejo ne havis specialan ĉambron por brulvundita paciento, kaj se oni transsendus lin al alia loko, la vojaĝo de kelkcent kilometroj en sablejo kaŭzus al la paciento grandegajn dolorojn kaj danĝeron. Por mildigi la dolorojn al la paciento, ni aranĝis tuj en lia hejmo specialan ĉambron por kuraco. Per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso ni venkis la malfacilojn en ekipaĵoj kaj tekniko kaj faris zorgan kuracon. Ni flegis la pacieron tage kaj nokte, antiseptis kaj ŝanĝis al li unĝentojn.



Kuracisto de la ĉina kuraca taĉmento kaj maŭritania medicina laboranto kune faras operacion al maŭritania paciento de okulmalsano.

Post kuracado de pli ol 20 tagoj, resaniĝis la paciento serioze brulvundita.

La lokaj amasoj diris: “Se ne estus la ĉinaj kuracistoj, Dea Mamoudou ne povus resaniĝi, eĉ se li estus vundita malpli serioze.” Dea Mamoudou diris: “Prezidanto Maŭ donis al mi la duan vivon.”

POR SAVI MALSANULOJN

Decembron de 1968, en la vilaĝoj de la regiono Aïoun cirkulis morbilo de kiu multaj homoj mortis. Informiĝinte pri tio, membroj de la ĉina kuraca taĉmento tuj iris tien. Iu kuracisto de internaj malsanoj estis kaptita de malario survoje, havis

febron super 39° C kaj tremis tra la tuta korpo. Popolanoj de la loko admonis ke li ripozu, sed li diris: “Por savi maŭritaniajn popolanojn, por la sano de la maŭritania popolo, mi ne devas ripozi!” Recitante en si la vortojn de Prezidanto Maŭ “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”, li persiste vizitis malsanulojn unun post alia en iliaj domoj. Oni proponis, ke la malsanuloj koncentriĝu kune por ricevi kuracon, sed li diris: “Mi mem prenu malfacilojn por ilin venki kaj lasu al aliaj oportunojn.” Kaj tiel li trairis, spite al la malsano, kelkajn grandajn kaj malgrandajn vilaĝojn kaj kuracis pli ol mil homojn. Vidinte la sindonemon de la ĉinaj kuracistoj por alies bono, iu maljuna paŝtisto de la vilaĝo Koperniko diris kun emocio: “En 1967, epidemio atakis nian vilaĝon kaj en la daŭro de nur kelkaj tagoj jam mortis pli ol 60 plenkreskuloj kaj infanoj. En la kuranta jaro, venis ĉinaj kuracistoj volonte, kaj ili savis multajn homojn.” Iu paŝtisto de la vilaĝo Aineiladau verkis kaj prezentis kanton por bonvenigi la ĉinajn kuracistojn en kunveno: “Al nia vilaĝo Aineiladau venis ĉinaj kuracistoj. Ni tre ĝojas kaj dankas al la granda Ĉinio kaj la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”

KULTURI NEFORIRONTAN KURACAN TAĈMENTON

En la du jaroj, dum la preventado kaj kuracado de malsanoj por la maŭritania popolo, la ĉina kuraca taĉmento senrezerve instruis kuracarton al la lokaj medicinaj laborantoj kaj helpis ilin kulture siajn proprajn kuracistojn, por krei neforirontan kuracan taĉmenton.

Pro longa regado de imperiismo, la maŭritania popolo havas malmultajn medicinajn laborantojn kies teknika nivelo estas nealta, eĉ tiuj, kiuj iam laboris en hospitaloj administrataj de imperiismaj landoj, ne havis ŝancon por lerni teknikon. Iu ĉeflegistino nomata Neang lernis anestezadon dum kvar jaroj en iu hospitalo administrata de imperiisma lando, sed al ŝi estis malpermesate eĉ fari vejnan injekton. Iu flegistino laboris dek jarojn en operaciejo de iu hospitalo administrata de fremdlandanoj, sed ŝi ellernis nur purigadon de instrumentoj. La membroj de la ĉina kuraca taĉmento decidis instrui siajn sciojn al la lokaj medicinaj laborantoj. Por ke flegistino Houna mastro la teknikon de akupunkturo, ĉina akupunkturisto tradukis la nomojn de akupunkturaj punktoj en la francan lingvon,



Ĉina kuracisto preventas kaj kuracas malsanojn al maŭritaniaj infanoj.



La maŭritania paŝtistino, al kiu ĉinaj kuracistoj amputis uteran tumoron, senlime dankas la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanton Maŭ. Tenante portreton de Prezidanto Maŭ ŝi fotigis sin kune kun ĉinaj kuracistinoj.

montris al ŝi iliajn lokojn sur sia propra korpo kaj lasis ŝin prove lin piki, tiel ke ŝi fundamente ellernis akupunkturajn teknikojn. Sub la sincera helpo de ĉinaj kuracistoj du flegistinoj de okulmalsano, kiuj laboris kune kun la ĉina kuraca taĉmento, jam povas mem fari operacion pri katarakto. La operacia grupo organizita de ĉeflegisto Maudi kaj kulturita de la ĉina kuraca taĉmento en la sanitarejo de Nema jam mem faris sukcesajn komplikajn operaciojn pri hernio, urinvezika ŝtono kaj aliaj. En la regiono Aioun, la ĉeflegistino Neang sukcesis amputi tumoron de utero kun pezo de 6 kilogra-

moj al iu virino suferinta pli ol dek jarojn. Ili diris: "Prezidanto Maŭ sendis al ni ĉinan kuracan taĉmenton por helpi Maŭritanion iri la vojon al sendependeco kaj memstareco kaj de sinapogo sur propraj fortoj en medicina afero. Ili postlasis al ni neforirontan kuracan taĉmenton."

RECIPROKA HELPO INTER LA ĈINA KAJ MAŬRITANIA POPOLOJ

En majo de 1970, ĉinaj kuracistoj ricevis peton pri urĝa savo al agonianta malsanulo en Kiffa.



La maŭritania ministro de higieno kaj laboro Ahmed Ben Amar (la dekstra) aranĝis adiaŭan ceremonion por la membroj de la ĉina kuraca taĉmento revenontaj al la patrolando kaj prezentis al ili donacon.

Dank' al la helpo de la maŭritania registaro ni veturis pli ol 500 kilometrojn en nokto kaj sukcese plenumis la taskon.

Sur la vojo de returno perturbiĝis nia aŭto kaj ĝi haltis en mezo de granda dezerto. La temperaturo altis super 60° C. Varmaj aerondoj senĉese ĵetiĝis al ni. Pasis unu diurno kaj el nia akvo restis tre malmulte, sed aperis neniŭ aŭto aŭ homo. Ŝoforo Faudelin estis forte emociita de tio, ke la ĉinaj kuracistoj riparos kune kun li sub la ĉasio kaj donis al li ŝparitan trinkakvon. Kaj tio rememorigis lin, kiel li ofte estis batata kaj riproĉata de francaj imperiistoj dum lia stirado de aŭto por ili. Por kiel eble plej rapide ripari la aŭton, antaŭ la sekvinta tagiĝo li nerimarkite jam foriris al iu vilaĝo 30 kilometrojn malproksima por serĉi tie akvon kaj aŭton.

Post la foriro de Faudelin, tuj antaŭ tagmezo preterpasis maljuna paŝtisto sur kamelo. Sciiginte ke la aŭto de ni ĉinaj kuracistoj paneis kaj mankas al ni akvo, li tuj verŝis al ni la nuran kvanton da akvo el sia ŝaffela sako. Kaj, vidinte ke la akvo

estas tute ne sufiĉa por tiel multaj homoj, li iris foren tri horojn kaj portis al ni plenan sakon da akvo. Kiam ni esprimis nian dankon, li diris: "Mi scias, ke vi estas kuracistoj alsenditaj de Prezidanto Maŭ por helpi nin malriĉulojn. Ni estas fratoj, do ne danku por reciproka helpo!" En noktomezo de la sekvinta tago, preterpasis kamiono. Vidinte nin en malfacilo, malgraŭ sia vojohasto la ŝoforo tuj donis al ni helpon, dank' al kio la aŭto estis riparita. Nelonge poste ankaŭ nia ŝoforo Faudelin revenis kaj baldaŭ ni atingis nian loĝlokon. Estas neeble mencii ĉion pri la zorgemo kaj varma amo de la maŭritania popolo al la ĉina kuraca taĉmento, al la ĉina popolo kaj Prezidanto Maŭ.

Ni ĉiam alte taksas la profundan batalan amikecon inter ni kaj la maŭritania popolo. Ambaŭ niaj popoloj kompakte unuiĝos kaj ĝisfine batalos por venki la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn!

* La aŭtoro estas estro de la ĉina kuraca taĉmento al Maŭritanio.



Giganta Ŝanĝiĝo en Pangin

LIU ŜENGTIAN

NIA regiono Pangin situas apud la maro Bohaj, sur la okcidenta bordo de Liaŭhe-rivero en la suda parto de Liaŭning-provinco. Ĝi estas ebenejo postlasita de maro.

Antaŭ la Liberiĝo, imperiismo, feŭdaj fortoj kaj burokrata burĝaro faris en koluzio kruelegajn ekspluaton kaj subpremon al la vasta laboranta popolo, tiel ke multe da laboruloj formigris de sia hejmloko kaj mortis pro turmento. La riĉa Pangin-regiono fariĝis marĉoj plenaj de herboj kaj veproĵoj kaj salalkalaj terpecoj sen ajna vegetaĵo.

Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la popolo de Pangin-regiono kreis tie akvokampojn, faris akvoutiligan konstruadon kaj aliajn fundamentajn konstruojn de kampoj, fondis kelkdek ŝtatajn kultivejojn, paŝtejojn, frugmitejojn kaj popolajn komunumojn. La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ plie akcelis la ekspluaton kaj konstruadon de Pangin. Hodiaŭ, la fizionomio de Pangin multe ŝanĝiĝis.

Ĉi tie, la homoj armitaj per Maŭzedongpenso sin apogas sur siaj propraj fortoj kaj peneme luktas en malfaciloj. La antaŭa salalkala areo nun fariĝis senlima verda maro de rizo, la dekoj da riveroj gran-


daj kaj malgrandaj, kiuj antaŭe alportis senĉesan damaĝon, nun fariĝis tre utila irigacia kaj drena reto kaj la antaŭa dezerta Pangin nun fariĝis riĉa loko kun plenampleksa disvolviĝo de agrikulturo, forstado, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado.

Tamen la ekspluato kaj konstruado de Pangin ja trapasis tre akran kaj tre intensan klasan kaj linian batalon!

NEPRE KONSTRUI GRANDAN GRENEJON

Antaŭ la granda kultura revolucio, la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj freneze opoziciis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj rifuzis plenumi la ĝeneralan principon por disvolvo de la nacia ekonomio elmetitan de Prezidanto Maŭ “**preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron**”. Ili galimatiis, ke Liaŭning estas “ĉefa punkto” de industrio, kaj sub la preteksto “**unue disvolvi pezan industrion**” ili plenergie antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucion reviziisman linion “**akcenti la urbojn kaj neglekti la kamparon**”, “**akcenti industrion kaj neglekti agrikulturon**” ktp., energie entreprenis “**industriaĵajn urbojn**” kaj “**industriaĵajn provincojn**”, blinde multigis loĝantaron

Antaŭa salalkala tero turniĝis en la hodiaŭan grenejon.



de urboj, fabrikis kaj pligrandigis la diferencojn inter la urboj kaj kamparo kaj inter la laboristoj kaj kamparanoj, deviigis industrion de la vojo **“preni agrikulturon kiel bazon”** kaj obstrukcis la glatan disvolviĝon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Pro tio ke plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon energie antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucion reviziisman linion, la agrikulturo de Liaŭning estis multe malpli progressa ol industrio.

En majo de 1968, naskiĝis la revolucia komitato de Liaŭning. Post sia fondiĝo, la revolucia komitato tuj kritikis senkompate la kontraŭrevolucion reviziisman linion, firme efektivigis la instruon

“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo” kaj la ĝeneralan principon de disvolvo de la nacia ekonomio **“preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron”** elmetitajn de Prezidanto Maŭ, decidis rapide disvolvi agrikulturon samtempe kun la energia disvolvo de industrio. La provinca revolucia komitato opiniis: La ĝenerala principo de disvolvo de la nacia ekonomio **“preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron”** estas ĝenerala principo de la ekonomia konstruado dum la tuta socialisma historia etapo. Nur se oni agos laŭ tiu ĉi principo, oni povos havigi al industrio materialojn kaj merkaton, akumuli kapitalon kaj pli rapide disvolvi industrion; povos redukti la diferencojn inter la urboj kaj kamparo, plifirmigi la

aliancon de la laboristoj kaj kamparanoj kaj pli-fortikigi la proletaran diktaturon; povos starigi sendependan ekonomian sistemon kaj akceli la disvolvon de la tuta nacia ekonomio. Alie, se oni unuflankece disvolvos industrion, la nacia ekonomio disvolviĝos kriple kaj iros sur eraran vojon.

Por rapide disvolvi agrikulturon, la provinca revolucia komitato difinis Pangin-regionon kiel gravan lokon de konstruado. Ĝi alvokis la popolon de la tuta provinco subteni la ekspluaton kaj konstruadon de la regiono kaj sendis tien kelkdek mil intelektajn junulojn kaj kadrojn, kiuj jam fariĝis la ĉefa forto en ĝia ekspluatado. Dank' al la vasta kunlaboro de la tuta provinco, fervojo kun longeco de 32 kilometroj estis konstruita en nur 48 tagoj. La ĉefaj respondeculoj de la provinca revolucia komitato kelkfoje venis al Pangin kaj ĝustatempe transkomunikis la gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri disvolvo de agrikulturo de Liaŭning, kiuj ekstreme kuraĝigis la vastajn amasojn de la regiono.

Tuj post la fondiĝo de la revolucia komitato de la regiono, estis starigitaj pli ol 20 grupoj de ĝenerala esploro konsistantaj el diversnivelaj gvidaj kadroj, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj teknikistoj. La grupoj restigis piedsignojn ĉie en la regiono, faris esploron al akvofontoj kaj alkalaj kampoj. Post detala kaj serioza esploro de kelkdek tagoj, ni akiris klaran konon pri Pangin-regiono kaj ellaboris planon de rapidega ekspluato de Pangin: transformi en kelkaj jaroj ĉiujn marĉojn kaj sal-alkalajn kampojn de la tuta regiono en akvokampojn, ĝisfunde aliformi Pangin kaj ŝanĝi ĝin en grandan grenejon. Informiĝinte pri la ĝojiga plano, la popolo de la tuta regiono tuj ekagis.

VEKI LA TERON EL DORMO DE MIL JAROJ

Laŭ la plano, en vintro de 1968 kaj printempo de 1969 ni devis transformi 300,000 muojn da alkala kaj dezerta tero en bonajn agrojn kaj akiri rikolton en la sama jaro. Por tion atingi ni devis fosi pli

Intelektaj gejunuloj lernas de veterana terkulturisto teknikon de kultivado de vinberarboj.





ol dek mil drenajn kaj irigaciajn kanalojn kaj konstrui pli ol mil pontojn, subajn akvotrafluejojn, kluzojn kaj pumpstaciojn.

En frosta vintro, armeo da homoj venis al la konstruejo por batali kontraŭ la naturo. En tranĉe frosta vento, la homoj rompis glacieron kaj elprenis teron, fosis kanalojn kaj konstruis digojn, kun penema laborado tage kaj nokte. En ĉirkaŭo de marĉo estis 80,000 muoj da virga tero. Antaŭe pro manko de akvo, oni ne ekspluatis ilin. La revolucia komitato de la regiono decidis fosi ĉefan kanalon 13.5 kilometrojn longan per kiu oni povos alkonduki akvon el la rivero Ŝuangtajzi por formi akvokampojn. Ĉi tie la marĉo estis profunda kaj herboj densaj. Fragmitoj rete radikigiĝis en la profunda ŝlimo, kaj en la temperaturo de -30°C la ŝlimaĵo glaciigis kaj fariĝis malmola kiel ferbetono, tiel ke la konstruado renkontis grandajn malfacilojn. Sed la volo de la laborantoj estis pli malmola. Ju pli ili marteladis, des pli ili batalis energie. Fine ili rompis la glaciigintan tertavolon, tiel ke ili rapide kaj altkvalite finis la konstruadon de la lageto en nur 6 monatoj, kiun oni planis finkonstrui en la jaro 1971.

Por konstrui kontraŭtajdan kluzon kaj pumpstacion por alkonduki la akvon de Liaŭhe-rivero, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo Guĉengzi mem projektis lernante. Avo Vang Dianĝen, kiu laboris 40 jarojn kiel lignaĵisto, faris okul- kaj paŝ-mezuron laŭ la rivero Liaŭhe, akiris precizajn donitaĵojn per

simplaj mezuriloj kaj bonan konon pri la terformo kaj geologia stato kaj rapide difinis lokojn por la konstruotaj kluzo kaj stacio. Maljuna komunisto Ĝang Deguj, kiu pasigis kelkdek jarojn apud la rivero, tre klare sciis, kiam la rivero ŝveliĝas kaj kiam ĝi sekigigas. Li pene studis, faris simplajn mezurilojn el bambuo kaj vitraj boteloj, por scii la rapidecon kaj profundecon de la fluo. Tiamaniere, li desegnis simplajn konstruajn planojn unun post alia.

La kontraŭtajda kluzo longas 33 metrojn, altas 2 metrojn kaj larĝas 4 metrojn. La konstruo de ĝia bazo bezonis pli ol 3,000 kubmetrojn da gruzo. Sub la gvido de 53-jara Vang Heŝeng, malriĉkamparano-komunisto, oni kondukis kelkdek ĉevalĉarojn kaj alportis, post penlaboro en pli ol unu monato, la bezonatajn gruzojn, tiel ke 110,000 juanoj por transportado de gruzo estis ŝparitaj.

Tiamaniere, per sia propra forto, ili konstruis la kontraŭtajdan kluzon kaj pumpstacion, sed la elspezo estis nur dekono de sama konstruaĵo. La efikeco estis dekoble pli granda, sed la konstrua tempo estis reduktita je 20 monatoj, kaj la irigaciata kampareo plivastiĝis je pli ol 10,000 muoj.

ANTAŬENMARŜI EN MALFACILOJ

Post penado de unu aŭtuno kaj unu vintro, ni akiris venkon en la ekspluato de la regiono Pangin, sed, malfaciloj ankoraŭ atakis nin senĉese. En 1969, kiam estis sezono de transplantado, ni renkontis seriozan sekecon. Senakviĝis la rizkampoj, kaj



Granda kvanto da greno produktita de Pangin estas enaŭtigata por transporti aliloken.

la ĵus transplantitaj verdaj rizidoj flaviĝis kaj poste velkiĝis. Ĉu ni povos replanti rizidojn sur kelkcent mil muoj da kampoj kaj protekti ilin, tio influos la sukceson de la ekspluato kaj konstruado de la regiono Pangin kaj la manifestiĝon de la giganta potenco de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ pere de praktikado. Antaŭ la malfacilo, ni ĉiuj firme decidis: "Por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, ni batalos por venki ĉian ajn malfacilegon."

Sekve, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu maljunuloj aŭ junuloj, ĉiuj sin ĵetis en la batalon de protekto de rizidoj kontraŭ sekegeco. Ili ĉerpis akvon el kanaloj kaj kavegoj kaj verŝis ĝin en la kampojn. Poste ili replantis rizidojn unu post alia. Apenaŭ pli ol 40 familianoj de laboristoj de Hinli-kultivejo finis la transplantadon sur nove kreitaj 140 muoj da akvokampoj, okazis sekegeco. Ili faris akvumon kaj refoje plantis rizidojn, sed ĉar la akvo estis malmulta kaj tre alkala, rizidoj sur iuj kampoj velkiĝis. Tiam jam estis la fino de junio, nome baldaŭ forpasos la sezono por transplantado de rizido. Ili firme diris: "Por konstrui novan Pangin, ni nepre tenos la kampojn plenaj je rizidoj, eĉ se por tio ni devus rompi al ni la talion kaj fingrojn!" Ili forlavis la alkalon, enverŝis dolĉan akvon kaj faris triafojan plantadon!

Post senĉesa klopodo en tagoj kaj noktoj de pli ol duonmonato, la vastaj amasoj fine sukcesis replanti rizidojn sur ĉiuj nove konstruitaj kampoj.

La amasoj armitaj per Maŭzedongpenso marŝas antaŭen en venko kaj venkis ankaŭ aliajn naturajn katastrofojn, tiel ke la produktokvanto de rizo estis pli granda kompare kun tiu de la riĉrikolta jaro 1968, kaj la produktokvanto de rizo de 1970 estis je 45% pli granda kompare kun tiu de 1968.

INDUSTRIO SUBTENAS AGRIKULTURON

Samtempe kun la grandskala entrepreno de kampa fundamenta konstruado, disvolviĝas ankaŭ bazaj industrioj servantaj al la agrikultura produkto. En la lastaj pli ol du jaroj, flugrapide ĝeneraliĝas la irigaciado kaj apliko de mekaniko, elektro kaj kemia sterko en agrikulturo, kio rapidigis la konstruadon de Pangin. Nuntempe, ĉiuj kultivejoj kaj komunumoj starigis staciojn de agrikulturaj maŝinoj kiuj havas traktorojn kaj maŝintiratajn agrikulturilojn. Nun la regiono havas pli ol 5,000 traktorojn, malgrandajn traktorojn kaj maŝintiratajn agrikulturilojn. Estis kompletigitaj la maŝintirataj agrikulturiloj fabrikitaj per avangardaj kaj simplaj metodoj. Realiĝis kompleta mekanikigo de plugado, erpado, transplantado, mezplugado kaj draŝado.

La tutprovinca popolo unuiĝas kiel unu homo kaj pene batalas por konstrui Pangin. En la konstruado de Pangin ĉiu venko super malfacilo, ĉiu antaŭenpaŝo kaj ĉiu sukceso estas akiritaj dank' al la subteno de la tutprovinca popolo. Por faciligi laboron kaj rapidigi transplantadon, la laboristoj de nia provinco energie kondukis teknikan renovigon, pene esploris kaj fabrikis rizidplantmaŝinojn de pluraj specoj, tiel ke la laborefiko kvinoble altiĝis. Aŭdinte ke ni bezonas traktorojn, akvopumpilojn kaj agrikulturilojn, la laboristoj de Ŝenjang, Anŝan kaj aliaj urboj tion fabrikis kaj rapide sendis al ni. Ili diris: "Disvolviĝo de industrio estas neebla sen subteno de agrikulturo. Ni subtenas Pangin, kaj same Pangin subtenas nin."

Ni decidis preni Daĝaj kiel ekzemplon kaj rapidigi la ekspluaton kaj konstruon de nova Pangin. En ne malproksima estonteco, ni ne nur konstruos Pangin en daĝaj-tipan regionon, sed ankaŭ Liaŭning en daĝaj-tipan provincon, por fari pli grandan kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

**La aŭtoro estas vicestro de la revolucia komitato de Liaŭning kaj estro de la revolucia komitato de la regiono Pangin.*

Ĉa Jankjun Reformis

Ŝpinmaŝinon

TIO okazis en la Unua Ŝtata Kotonŝpinejo de Vuhi, Giangsu-provinco de nia lando.

Ŝpinistinoj navede iradis inter la ŝpinmaŝinoj kaj ĉiuj atente observadis la funkcion de la renovigitaj kaj ordinaraj ŝpinmaŝinoj. Kiam la turniĝa rapideco de la spindeloj de la ordinaraj ŝpinmaŝinoj superis 13,000 revoluojn por minuto, aperis sinsekvaj rompiĝoj de fadeno kaj vana turniĝado de iuj spindeloj. Sed kiam la turniĝa rapideco de la spindeloj de la renovigita maŝino altiĝis ĝis 24,000 revoluoj por minuto, neĝblanka fadeno ankoraŭ rondflugis ĉirkaŭ la spindeloj.

“Sukcesis la eksperimento!” Tuj ekbolis la laborejo.

Ja estas nova afero en la ŝpinteksa industrio, ke la turniĝa rapideco de spindelo atingis 24,000 revoluojn en ĉiu minuto. En la projektado por tiu grava renovigo, kompartianino Ĉa Jankjun, kiu estas teknikistino el laboristino, faris grandan kontribuon.

Kiam Ĉa Jankjun partoprenis la studadon de altrapida ŝpinmaŝino en la komenco de marto de 1966, ŝi tuj renkontis batalon inter la du ideologioj kaj la du linioj.

En la unua tago, kiam eklaboris la studa grupo, iu teknikisto diris al la laboristoj kaj teknikistoj de la grupo: “Nia grupo devas studi pintan teknikon. Nun la spindeloj de ĉiuj ŝpinejoj de la provinco jam kadukiĝis kaj ne povas funkcii altrapide. Ni proponu, ke oni tuj forpuŝu ilin!” Apenaŭ finiĝis lia parolo, la grupo jam dronis en brua ĥaoso.

“Kio? Forpuŝi ĉiujn spindelajn de la ŝpinejoj de la tuta provinco? Ne! Ni devas akiri ŝpinaĵon de la ekzistantaj ekipaĵoj.”

Ĉa Jankjun klare vidis, ke la slogano elmetita de maljuna laboristo konformas al la intereso

de la socialisma konstruado kaj la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ “**konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**”. Ŝi diris: “Nia grupo devas fari esploran laboron konforman al la realaĵo. La ekzistantaj spindeloj ne devas esti forpuŝitaj kaj ankaŭ la malnovaj maŝinoj devas fari novan kontribuon al la socialisma konstruado de la patrolando!”

Ĉa Jankjun devenis de laborista familio kaj eklaboris en silkfabriko kiam ŝi estis nur okjara. Ŝi multe suferis de kapitalista ekspluatado kaj vivaĉis en mizero.

En la jaro 1949, sub la komando de Prezidanto Maŭ, miliono da ĈPLA-anoj transiris Jangzi-riveron. De tiam ŝi, kvazaŭ la ĵus elteriĝinta plantido, sane kreskis sub la brila suno, kaj ŝi laboradis senlace.

En 1953, la Partio sendis ŝin en la Teknikan Lernejon de Laboristoj kaj Kampanoj de Giangsu por studo. Sed ĉar la malnova eduko tute apartiĝis de la realo, ŝi eĉ erare notis la direkton sur desegno en sia unua projektado post la diplomiĝo, kaj ŝi devis solvi tiun problemon sub la helpo de laboristoj.

De tiam, ŝi ĉiam klopodas lerni de maljunaj laboristoj kaj modeste akceptas helpon kaj edukon de ili. Poste ŝi glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

Ankaŭ en la reformado de ŝpinmaŝino Ĉa Jankjun studis kaj esploris kune kun la laboristaj amasoj.

Dum la eksperimentado per 20 spindeloj en la komenca periodo, la studa grupo fiaskis plurfoje. Ŝi intencis malaltigi la rapidecon por mildigi la kontraŭdiron, sed laboristoj proponis altigi la rapidecon dum la eksperimento kaj krome proponis entre-

preni eksperimenton en produkta laborejo. Laboristoj diris, ke la maŝinpecoj estas projektitaj laŭ kondiĉoj de altrapideca funkciado, tial ili povas adaptiĝi nur al tia kondiĉo. Kvankam eksperimentado en la laboratorio povas produkti certajn donitaĵojn, tamen tia provo estas farata en izoliteco sen la moviĝantaj cirkonstancoj kaj ne povas plene vidigi la kontraŭdiron. Kaj la afero iris ĝuste kiel la laboristoj asertis: la eksperimento pri pliigo de rapideco en produkta laborejo ne nur malkaŝis la diversajn flankojn de la kontraŭdiro, sed ankaŭ ebligis trovi la metodon por solvi la problemon.

La rapideco estis pligrandigita, tamen oni ne povis plene solvi la problemon de ŝanceliĝado de la spindeloj.

Estas multaj faktoroj kiuj influis la stabilecon de la spindeloj, ekzemple la turniĝa rapideco, la strukturo, la maniero de transmisio de movo. Kio estas la ĉefa kontraŭdiro en vero?

Foje en kunveno, parolado de iu ŝpinistino multe inspiris Ĉa Jankjun. La laboristino diris, ke por teni flagon senŝanceliĝe en ventego, unue oni devas fiksi la stangon en tero kaj due firme teni ĝin.

Jes! la ŝanceliĝado de la spindeloj estiĝis ĝuste pro nefirma fiksado. Ĉa Jankjun kaj laboristoj faris fojrefojan studon kaj decidis aldoni du novajn partojn al spindelino. Kune kun laboristoj ŝi

faris eksperimentojn pri diversaj materialoj kaj dekojn da projektoj, multfoje renovigis la teknologion kaj fine sukcesis elfari du novajn partojn post pli ol 200 fiaskoj, tute solvis tiamaniere la problemon de ŝanceliĝado de spindelo kaj tiris el la praktiko novan teorion pri altrapideca spindelo.

La reformado de la malnova spindelo sukcesis.

La rapideco de la spindeloj de ŝpinmaŝino altiĝis de 13,000 ĝis 18,000 rivoluoj en ĉiu minuto kaj la produktokvanto de 1,000 spindeloj en ĉiu horo impete kreskis de ĉ. 30 kg. ĝis pli ol 40 kg.

En kelkaj sinsekvaj tagoj, Ĉa Jankjun atente observadis la funkciajn statojn de la maŝinoj kaj la delikatajn ŝanĝiĝojn de ĉiu parto en laboro. Dank' al persona manipulado kaj fojrefoja esploro kun laboristoj, ŝi trovis, ke alia peco de la ŝpinmaŝino ne povas akomodiĝi al la altrapida funkciado de spindelo kaj tio malhelpas daŭran altigon de la produktokvanto.

Ĉa Jankjun kaj laboristoj plue solvis tiun kontraŭdiron tute senhezite.

Tiam iu diris al ŝi: "Jankjun, sufiĉas por ni ĝeneraligi la nunan produktan nivelon, por kio do ankoraŭ serĉi novajn leĝojn!" Sed Ĉa Jankjun ne tiel opiniis. Ŝi diris: "Ne estas fino por ni en revoluciado, ni devas daŭre marŝi antaŭen."



Ĉa Jankjun (la unua de maldekstre) interkonsiliĝas kun gelaboristoj pri teknika renovigo.



Vojo por Pliprodukto de Arakido

JAŬ ŜIĈANG

MI estas kampulo nun 47-jara. En la lastaj jaroj mi konstante studas la brilajn filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ kaj per dialektika materiismo direktas la sciencan eksperimenton por pliprodukto de arakido, tiel ke la pomua arakida produktokvanto de nia brigado paŝon post paŝo kreskis de pli ol 200 ĝinoj antaŭ 1958 ĝis pli ol 450 ĝinoj kaj tiu de iuj parceloj eĉ atingis pli ol 800 ĝinojn. El la praktiko mi profunde konis ke la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ estas voj-lampo por ni en scienca eksperimento.

TURNI MALSUKCESON EN SUKCESON

La plejparto de la agroj de nia brigado situas sur montetoj kaj 2,000 el la pli ol 4,800 muoj da agroj estas arakidaj kampoj. Por altigi la produktokvanton de arakido, en 1953 mi ekklopodis trovi metodon por pliprodukto. Tiam la eksperimento ne sukcesis pro manko de Maŭzedongpenso en komando kaj manko de dialektika materiismo kaj klara direkto. En 1958, dum la tempo por semado de arakido nia loko suferis de sekegeco, la arakidaj semoj ne ĉiuj povis ĝermi normale. Zaŭlindian-brigado aplikis semadan metodon fari profundajn sulkojn kaj kovri maldike per tero, kio povas garantii normalan ĝermadon de la semoj kaj sanan kreskon de la plantidoj. Tion aŭdinte mi proponis al nia brigado tiun metodon. Kvan-kam la metodo tre bone efikis en Zaŭlindian-brigado, tamen malsukcesis en nia brigado kaj reduktiĝis nia rikolto de arakido en aŭtuno.

Tiu fiasko min tre afliktis. Ĝuste en tiu tempo, la gvidantaj kamaradoj montris ke mi devas preni lecionon el la malsukceso. Kun tiu problemo mi serioze studis brilajn filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Li instruis al ni: **“Nur tiuj, kiuj konsideras problemojn subjektive, unufanke kaj supraĵe, ordonas aŭ instrukcias memfideme kien ajn alveninte, ne konsiderante la cirkonstancojn, ne pririgardante la tuton de la afero (la historion kaj la tutan nunan staton de la afero) kaj ne tuŝante la esencon de la afero (la naturon de la afero kaj la internajn rilatojn inter tiu ĉi kaj aliaj aferoj). El tiaj homoj neniu ne stumble falos.”** Tion legante, mi ekhavis klaran penson kaj trovis ke mi faris metafizikan eraron kopie apliki alies sperton sen enketo de la konkretaj kondiĉoj. Zaŭlindian-brigado havas bonajn kampojn sur ebenejo kun larĝaj spacoj inter la arakidaj vicoj, tial fari profundajn sulkojn kaj kovri per maldika tertavolo povas garantii normalan ĝermadon de ĉiuj semoj. Sed la kampoj de nia brigado estas malfekundaj en montetoj por kiuj necesas semi dense je mallarĝaj linioj, tial farante profundajn sulkojn oni neeviteble movis teron en la arakidajn sulkojn kaj tiel kovris la profundajn sulkojn per dika tertavolo, kaj rezulte de tio reduktiĝis la arakida produkto. La filozofia penso de Prezidanto Maŭ ebligis al mi trovi la kaŭzon de malsukceso, t.e. mia subjektiva kono ne konformis al la objektiva realo kaj mia kono pri la objektiva mondo estis senkonscia kaj pasiva. Mi decidis, aplikante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ, daŭre persisti en la scienca eksperimentado pri pliprodukto de arakido kaj turni la malsukceson en sukceson.

ESPLORO PRI LA KRESKAJ LEĜOJ DE ARAKIDO

Mi decidis trovi la kreskajn leĝojn de arakido kaj trovi vojon de arakida pliprodukto. Kiel trovi la leĝojn? Mi tutajn tagojn cerbumis pri kaj absorbiĝis de tio. Sed en longa tempo mi akiris nenion. Kion fari? Mi malfermis *Pri Praktiko* kaj studis frazon post frazo. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Kiu ajn volas ion koni, ne povas fari alimaniere ol kontakti kun tio, t.e. vivi (praktiki) en ties medio.”** Mi decidis esplori en praktiko la kreskajn leĝojn de arakido.

Antaŭ ĉio mi komencis esplori floradon de arakido. Mi elektis du arojn da arakidaj plantoj por observado. Antaŭe mi nur sciis ke arakidoj floras en nokto, sed ne sciis la precizan horon, mi do tute nokte gardis surkampe en tri sinsekvaj noktoj kaj trovis ke tio okazas antaŭ la tagiĝo. De tiam mi ĉiunokte iris al observado antaŭtempe de la ekfloro, ligis al ĉiu floro etiketon kaj notis sur ĝi ekfloran daton por estonta studo. Spite de vento kaj pluvo mi persistis en observado de sinsekvaj pli ol 60 noktoj kaj ligis pli ol 170 etiketojn al la du aroj da arakidaj plantoj. Post la rikolto en aŭtuno mi zorge analizis la materialojn akiritajn en la observado kaj trovis ke necesas 65 tagoj por plena maturiĝo de arakido ekde ekfloro, la fruktoj de malpli ol 65 tagoj ne maturas kaj la maturaj fruktoj plejparte kreskas sur la plej frue elkreskinta paro de branĉetoj. Pro la atingo mi tre ĝojis. Sed, pripensinte la instruon de Prezidanto Maŭ, mi vidis ke tio estas nur komenca eltrovo en unuajara praktiko kaj necesas remeti la konkludon en praktikon por konstati ĉu ĝi pravas. Do mi daŭrigis la observadon kaj studon en la sekvinta jaro. La plua observado ne nur pravigis la leĝojn eltrovitajn en la unua jaro sed ankaŭ alportis novan frukton. Mi trovis ke 60-70 procentoj de la maturaj fruktoj kreskas sur la unua paro de branĉetoj kaj 20-30 procentoj sur la dua paro, kaj sur la tria paro nur kelkaj fruktoj nematuraj. La dujara praktiko unuapaŝe malkovris la kreskan sekreton de arakido kaj iujn internajn ligiĝojn en tio.

Post kiam mi trovis la kreskajn leĝojn de arakido, mi senĉese faris eksperimentojn por altigi la produkton de arakido ilin aplikante. Por fari arakidon pliprodukta, oni devas zorgi ke la unua paro de branĉetoj plene ludu sian rolon. Ili troviĝas plej malsupre, do tro dika tavolo de kovranta tero malutilas al la fruktado, tial malprofunda semado

plej taŭgas. Sed en nia loko, ofte okazas printempa sekegeco, kaj la arakidaj semoj estas grandaj kaj oleriĉaj, kiuj bezonas longan tempon por ĝermado, tial malprofunda semado ofte kaŭzas sekiĝon kaj nenormalan ĝermadon de la semoj. Sen normala ĝermado de la semoj ne povas esti bazo de pliprodukto. Do normala ĝermado tiam estis la ĉefa kontraŭdiro kaj la rimedo por ĝin solvi estis profunda semado. Post solvo de la problemo de normala ĝermado, tio, ke la unua paro de branĉetoj kreskas profunde en la tero kio malutilas al la fruktado, fariĝis la ĉefa kontraŭdiro.

Kiel solvi tiun kontraŭdiron? Mi refoje min turnis al verkoj de Prezidanto Maŭ por helpo. En *Pri Kontraŭdiro* Prezidanto Maŭ montris: **“Ĝi (materiisma dialektiko) konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj.”** Laŭ mia analizo, la unua paro de branĉetoj floras frue kaj multe, do ĝia latentata povo estas granda. Sed profunda semado malfavoras al kresko de la unua paro de branĉetoj kaj al evolvo de ĝia latentata povo, tio signifas ke la ekstera kaŭzo ludas al ĝi limigan rolon. Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ mi serĉis en praktiko solvon de tiu problemo. Iun tagon, kiam mi forsarkis superflujajn plantidojn de panika milio kune kun maljuna malriĉkampano Vang Dianjuan, ni esploris la problemon kial oni ne butis plantidojn de panika milio. Li diris: **“Proverbo diras: Sunumu panikmiliajn radikojn kaj butu miliajn plantidojn. Sen sunumo al la radikoj ne povas esti pliprodukto de panika milio.”** Laborante mi pensis en mi: La plantidoj de panika milio disbranĉiĝas ĉe la radikoj, kaj oni ne butas ilin ĝuste en favoro al ilia disbranĉiĝo. Ĉu la disbranĉiĝo de panika milio kaj arakido ne estas la komuna karaktero de ambaŭ? Se oni povas forskrapi teron ĉe la radikoj de panika milio, kial oni ne povas fari la samon al arakidaj plantidoj? Tion pensante mi tuj iris en arakidan kampon kaj iom nudigis radikojn de aro da arakidaj plantidoj, kies radikoj estas blankaj kaj tiel delikataj, ke suko elfluis je pinĉo. Mi pensis en mi, ke sen ŝirmo de tero tiel delikataj radikoj certe velkiĝos de sunumo. En tiu momento venis al mi en la cerbon alia ideo: Sen eksperimento oni ne povas fari ĝustan konkludon. Mi do plie nudigis 22 arojn da arakidaj radikoj. Fakte pruvis ke la nudigitaj arakidaj plantidoj ne nur ne velkiĝis, kontraŭe iliaj ĉefaj radikoj purpuriĝis kaj malmoliĝis kiel arbaj branĉoj. Tiamaniere mi trovis metodon por garantii normalan ĝermadon

de ĉiuj semoj per profunda semado kaj por akceli la unuan paron de branĉetoj plene ludi sian rolon. Nudigo de radikoj cetere povas bridi la kreskon de la plantidoj, kio utilas al ilia venontaj kresko kaj fruktado. Mi do konsiliĝis kun la brigadaj kadroj pri starigo de 4 eksperimentaj parceloj en kampoj. La aŭtuna rikolto montris, ke la produktokvanto de la arakidaj plantoj kies radikojn mi nudigis, estis ĉ. 25 procentojn pli granda ol tiu de la aliaj. Tiun metodon de pliprodukto ni nomis "radiknudigo por bridi la kreskon de plantidoj".

SENĈESA ANTAŬENMARŜO EN SOLVO DE KONTRAŬDIROJ

Post disvastigo de la metodo en nia brigado, la komunumanoj tre ĝojis, ke multe plialtiĝis la arakida produktokvanto. Kaj mi profunde konis,

ke la filozofia penso de Prezidanto Maŭ malkovris al ni la sekreton de arakida pliprodukto. Oni ĉiam venkas en ĉio, se nur ili agas laŭ Maŭzedong-penso. Pro tio, observante la instruon de Prezidanto Maŭ "la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn", mi daŭrigis la eksperimenton por senĉese altigi produktokvanton de arakido.

Post pliapaŝa observo, mi trovis ke sur ĉiu flora nodo estas 6-7 floroj, sed ili donas nur 1-2 fruktojn. Kial floroj multas sed fruktoj malmultas? En la komenco mi opiniis ke tio rezultiĝas el nesufiĉeco de nutraĵo, ni do sterkis pli multe. Sed pli multa sterkado en la frua periodo kaŭzas senbridan kreskon de la ĉefaj tigoj kaj malpliigon de fruktoj sur la branĉetoj. Tiam mi ektrovis ke kontraŭdiro

Senfine Longa Verda Muro

LIN HAJ

ĈANGĈENG-KOMUNUMO de Vuvej-gubernio de Gansu-provinco estis malriĉa loko, kie la ĉielo estis nevidebla pro ruliĝanta sablovento, malaperis kampoj kaj domoj kaj loĝantoj devis migri tien kaj ĉi tien sur la vasta sablejo. En la lastaj pli ol dek jaroj, precipe post kiam komenĉiĝis la movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo", tieaj kadroj kaj amasoj, disvolvante la revolucian spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penemalukto kontraŭ malfaciloj, ĉiujare plantis sur la sablejo arbojn por bari venton kaj fiksi sablon, kaj tiel akcelis disvolviĝon de la agrikultura produkto kaj multege ŝanĝis la naturan fizionomion. Nun, ĉi tie prezentiga prospera sceno de senlima forsto, verda arbozono protektanta kampojn kaj vilaĝojn profunde en verdaj ombraĵoj. De 1967, tiu komunumo akiris riĉan rikolton de greno en sinsekvaj jaroj.

Ĉangĉeng-komunumo situas ĉe la rando de Tenggeli-sablejo de Interna Mongolio. La loko estas ĉirkaŭata oriente, okcidente kaj norde de sablo

kaj sude tuj apud Gobio. Antaŭ la Liberiĝo ĉi tie postrestinta estis la agrikultura produkto, kaj la meznombra pomua produktokvanto de greno estis nur kelkdek ĝinoj.


Post la Liberiĝo, aktive respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "organizigu", la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj klopodis por disvolvi agrikulturan produkton. En 1953, pli ol mil malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, alte tenante ruĝajn flagojn, kondukante kamelojn portantajn litaĵojn, manĝaĵojn kaj arbidojn, marŝis en Tenggeli-sablejon. Por planti arbojn ili fosis kavojn, en ilin metis teron kaj ilin akvumis per akvo alportita de loko 5-6 liojn fora. Tiamaniere, tiujare ili plantis pli ol 300 muojn da arboj, kaj pli ol 80% de la plantitaj arboj viviĝis. Sekve de akumulo de sperto pri forstado kaj senĉesa firmiĝo kaj disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, pli kaj pli grandiĝis la skalo de ilia forstado. Ĝis 1958, ili jam plantis pli ol du mil

troviĝas ankaŭ inter la ĉefa tigo kaj la branĉetoj. Tiu kontraŭdiro montriĝis ne tiel okulfrapa en la frua kreska periodo de arakido kaj ĝi elstariĝas nur post formiĝo de la unua kaj dua paroj de branĉetoj. En la frua periodo, la ĉefa tigo ludas gvidan rolon, fabrikas nutraĵon lumosinteze per siaj multaj folioj kaj tiel akcelas formiĝon kaj kreskon de la branĉetoj; sed kiam la unua kaj dua paroj de branĉetoj bezonas pli da nutraĵo dum siaj formiĝo, florado kaj fruktiĝo, la ĉefa tigo asimilas nutraĵon konkure kun la branĉetoj kio kaŭzas malabundecon de fruktoj sur la branĉetoj.

Kiel solvi tiun kontraŭdiron? Laŭ la rezono de transformiĝo de unu kontraŭdiro en alian eksplacita en *Pri Kontraŭdiro*, mi serioze faris analizon kaj, ligante la sperton de forigo de tiga pinto de kotonaj kaj melonaj plantoj, mi faris la samon al

arakidaj plantoj. Post la formiĝo de la dua paro de branĉetoj, mi forigis iliajn pintojn. La eksperimento montris, ke la unua paro floris 7 tagojn antaŭdate, kaj ĉiu aro da arakidaj plantoj pliproduktis 7 fruktojn. En la sekvinta jaro, ni faris parcelan eksperimenton, la plantoj kies branĉetaj pintoj estis forigitaj produktis ĉ. 8 procentojn pli multe da fruktoj al la aliaj arakidoj sub la samaj kondiĉoj de akvo kaj sterko.

En la praktiko mi konis, ke agrikulturo signifas traktadon de kontraŭdiroj kaj scienca eksperimento devas krei kondiĉojn por akceli la transformiĝon de la kontraŭdiroj en favoro al la revolucia konstrua afero de la homaro. La objektivaj aferoj ĉiam disvolviĝas, la ĉeno de kontraŭdiroj neniam finiĝos kaj ankaŭ la scienca eksperimentado neniam atingos sian limon.



muojn da arboj, kiuj ludis evidentan rolon en protekto de kampoj kaj disvolvado de agrikulturo.

Ĉiu paŝo de la forstado trairis intensan batalon inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. En la periodo kiam la nacia ekonomio renkontis provizorajn malfacilojn, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj tie disvastigis plenenergie kontraŭrevoluciajn, reviziismajn nigrajn varojn, kiaj “tri pliigoj kaj unu fikso”, “kvar liberoj” kun la intenco deviigi la kamparon de la socialisma direkto. En tiu kriza momento Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon “**nepre ne forgesu la klasbatalon**”. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la klasaj malamikoj, donis fortan baton al kapitalismaj fortoj kaj tiel venke antaŭenpuŝis la forstadon sur la socialisma vojo.

Ĉangĉeng-komunumo persistis en ĉiujara forstado. Ĝis 1966, la forstareo jam atingis pli ol 18,000 muojn, kiuj formiĝis arbozono kun longeco de 34 lioj kaj meznombra larĝeco de unu lio, kiu baris la moviĝantajn dunojn de Tenggeli-sablejo, protektis kampojn kaj garantiis rapidan disvolviĝon de la agrikultura produkto. En tiu jaro, la produktokvanto de greno de la tuta komunumo duobliĝis ol tiu antaŭ 1953.

Pro la sukceso aperis ĉe iuj homoj memkontento kaj malstreĉiĝo. Tiam la partia komitato de la komunumo organizis kadrojn kaj amasojn por ripetade studi koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, lerni la spiriton de Daĝaj pri daŭra revolucio, gvidante ilin resumi sperton de forstado. Dank’ al studado multe altiĝis la konscio de ĉiuj pri daŭra revolucio kaj elvolviĝis ilia energio por daŭra forstado.

En la pasinteco ĉiujare oni plantis arbojn ambaŭborde de Hongŝuj-rivero, sed ĉiujare ili estis forportitaj de superakvo. Kuraĝigite de la spirito de Daĝaj, la vastaj amasoj decidis venki superakvon kaj ankoraŭfoje tie planti arbojn. Tre krutaj estis la bordodeklivoj, ili do ŝtuparigis ilin kaj fosis kavojn sur la ŝtupoj por planti arbojn. Post penado en kelkaj jaroj, ili fine konstruis arbozonojn je 32 lioj longajn sur ambaŭ bordoj de Hongŝuj-rivero por bari sablon kaj protekti la bordojn.

Nun la totala forstareo de la tuta komunumo atingis pli ol 34,000 muojn. Ĉiu familio havas meznombre 18 muojn da arboj kaj ĉiu persono tri muojn. Krome, ili rekulturebligis pli ol 1,300 muojn da kampoj kovritaj de sablo en la pasinteco kaj evitigis minacon de sablovento al pli ol 1,400 muoj da kampoj, kaj tiel kreis favorajn kondiĉojn por disvolvi la agrikulturan produkton.

Abonu

Esperantan Gazeton

El Popola Ĉinio

El Popola Ĉinio estas monata esperanta gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo kaj koloraj bildpaĝoj.

Nia gazeto propagandas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson en diversaj formoj, kaj raportas pri la brilaj sukcesoj, kiujn la ĉina popolo akiris sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Abontarifo

Monoj	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
£ brita	0-10-0	0-15-0	1-0-0
Fr. franca	6.00	9.00	12.00
M. germana	6.00	9.00	12.00
\$ kanada	2.00	3.00	4.00
Gld. nederlanda	5.00	7.50	10.00
Kr. sveda	7.00	10.50	14.00
Eno japana	320.00	480.00	640.00
Por la landoj en Afriko kaj Azio:			
£ brita	0-5-0	0-7-6	0-10-0
Por la landoj en Latinameriko:			
\$ kanada	1.00	1.50	2.00
£ brita	0-7-0	0-10-6	0-14-0

Abonu ĝin ĉe lokaj perantoj aŭ rekte ĉe
la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

La Varme Akceptata Ĉina Halo en la Damaska Internacia Foiro

Siriaj junuloj ĝojas je ricevo de insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj tuj pinglas ĝin sur la bruston.



Dum la ekspoziciado en la siria ĉefurbo Damasko, la ĉina halo en la 17-a Damaska Internacia Foiro estis varme akceptata de la arabaj kaj palestinaj popolanoj. Nemalmultaj vizitantoj fotis sin por rememoro antaŭ la giganta portreto de Prezidanto Maŭ en la ekspozicia halo. Multaj vizitantoj petis de ĝiaj laborantoj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj insignojn kun lia portreto. Ili diris: “Ni varme amas Prezidanton Maŭ, ĉar li estas ne nur granda gvidanto de la ĉina popolo, sed ankaŭ granda instruanto de la mondaj revoluciaj popoloj.”



Palestinaj gerilaj batalantoj entuziasme petis verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili diris: “Prezidanto Maŭ estas granda proletara instruanto. En la batalo kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj, verkoj de Prezidanto Maŭ estas nemankigeblaj armiloj por ni.”



La ĉina halo en la Damaska Internacia Forio

Vizitantoj entuziasme laŭdas la revolucion spiriton de la daĝaj-
aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia lando.





Vizitantoj varme laŭdas la grandajn sukcesojn en nia elektra industrio.



Sur la opinia notlibro de la halo, vizitantoj skribis entuziasmajn laŭdojn pri la grandaj venkoj de la ĉina Granda Proletara Kultura Revolucio kaj la grandaj sukcesoj en la socialisma konstruado de Ĉinio, kaj pri ĝia firma subteno al la palestina kaj araba popoloj en ilia batalo kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agrosantoj.

Rondira Vendejo

SUR la alta malvarma stepo de la orienta Kinghaj de nia lando aktive funkcias rondira komerca grupo. Sub nutrado de la brila penso de la "tri popularaj artikoloj", la laborantoj de la grupo longdaŭre persistas por tutkore kaj tutanime servi al tibetaj paŝtistoj, spite de ventoneĝo kaj frosto sur la altebenejo pli ol 3,600 metrojn super la marnivelo. Ekde 1963, ili postlasis siajn spurojn tra la proksimaj montegoj. Iliaj progresemaĵoj faroj profunde gravuriĝis en la koroj de la paŝtistoj. La vastaj paŝtistaj amasoj kore nomas la komercan grupon vendejo tutkore kaj tutanime servanta al la popolo.

La grupo estis starigita en 1963 de la laborantoj de Duohemaŭ-vendejo de Zeku-gubernio de Kinghaj-provinco, laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri "tutkora kaj tutanima servo al la popolo". Duohemaŭ-vendejo situas en paŝta regiono de altebenejo kun trafiko neoportuna. En la pasinteco proksimaj tibetaj paŝtistoj, venantaj por aĉeto, bezonis iri montvojon de 50 ĝis 100 kilometroj, kaj tio ofte malhelpis la produkton. Pensante kion la amasoj pensas kaj zorgante kion la amasoj zorgas, la kamaradoj de la vendejo organizis rondiran komercan grupon kaj portas varojn al paŝtistaj jurtoj.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, ĉu en ventopluvo ĉu en frosta neĝado, ĝiaj laborantoj neniam interrompis sian rondiradon. Iufoje, kiam ekiris la rondira komerca grupo, estis serena vetero. Kiam ili transpasis monton pli ol 4,000 metrojn super la marnivelo, subite densiĝis nuboj, tondradis kaj torentis pluvo kun hajleroj kiel juglandoj. Krome, fulmobato ĉiam ajn minacis la irantojn. Spite al la vivdanĝero la kamaradoj de la grupo demetis siajn pluvvestojn, kovris per ili la varojn kaj daŭre iris antaŭen en la pluvego, kaj fine ili portis la varojn sekure al paŝtistaj jurtoj. Kiam paŝtistoj vidis la tutkorpe malsekigitajn kamaradojn de la rondira komerca grupo, ili estis tre kortuŝitaj. La paŝtistoj rapide fajrosekigis iliajn vestojn kaj entuziasme prezentis al ili glason post glaso da bongusta teo kun kumiso.

En aktiva disvolvo de rondira komerco, la grupo distribuas al la vastaj paŝtistaj amasoj verkojn de Prezidanto Maŭ kaj propagandas al ili Maŭzedongpenson. Ili vaste diskonigas koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, helpas la paŝtistojn forigi la kvar malnovojn (t. e. ideojn, kulturon, morojn kaj kutimojn) kaj starigi la kvar novojn de socialismo.

"Nud-piedaj Kuracistoj" en Atendejo de Staci-domo

Laŭ la deziro de legantoj ĉi-jare ni decidis plibonigi la aranĝon de tiu ĉi rubriko por ke ĝi fariĝu pli taŭga al la komencantoj. En la tekstoj ni uzos laŭeble facilajn vortojn kaj simplajn frazojn.

La Red.

Nun en la kamparo de nia lando estas tre multaj "nud-piedaj kuracistoj". Ili estas tiel nomataj ne pro tio, ke iliaj piedoj estas ĉiam

nudaj, sed pro tio, ke ili mem estas kamparanoj. Ili vivas, laboras kune kun la kamparanoj kaj servas kiel kuracistoj, kiam kamparano malsana-



niĝas.

Tiaj kuracistoj, kiuj ne forlasas sian profesion laboron, troviĝas nun ne nur en la kamparo, sed ankaŭ en aliaj sferoj. Ekzemple en la Pekina Staci-domo, ni vidas tiajn kuracistojn.

Antaŭ ne-longe iu vojaĝantino malsaniĝis en atendejo tie. Ŝi kuŝis

sur benko, kun pala vizaĝo kaj firme fermitaj okuloj, tut-korpe konvulsianta sen-ĉese. Kun granda maltrankvilo staris apud ŝi viro, kiu estis videble ŝia kun-vojaĝanto.

Tiam venis kelkaj laborantinoj de la staci-domo. Ili konsolis la gevojaĝantojn kaj dume unu el ili el-prenis kurac-pikilon kaj per ĝi faris kelkajn pikadojn sur la korpo de la malsanulino. Post tio, la malsanulino malfermis siajn okulojn kaj kvietiĝis.

K-dino Vang Juhua, alia el la laborantinoj, alportis akvon por doni al la malsanulino kuracilon kaj diris al ŝia kun-vojaĝanto: "Estu trankvila, ŝi jam resaniĝis!"

"Multajn dankojn al vi, doktorinoj!" diris la viro.

Fakte, ili ne estas doktorinoj, sed "nud-piedaj kuracistoj" praktikan-taj la higienan linion de Prezidanto Maŭ.

Kial laborantinoj de la stacio fariĝas "nud-piedaj kuracistoj"? Por tion klarigi, ni devas rakonti la jenan okazintaĵon.


Estis printempo de 1970. En la atendejo iu vojaĝanto subite malsaniĝis. Ili tuj portis lin al hospitalo por ricevi kuracon. Pro tio iu el ili opiniis, ke ili jam tre bone servis al la popolo. Sed granda parto de la laborantinoj opiniis alie. Ili diris, ke tio ne povas esti rigardata kiel tre bona servado al

la popolo, ĉar ili mem ne donis kura-can helpon al la vojaĝanto, sed nur lin portis al hospitalo.

Post diskutado, ili ĉiuj konsentis pri la lasta opinio. Kaj ekde tiam ili komencis lerni la kurac-arton per pikiloj por helpi malsanajn vojaĝantojn ĉe la stacio.

Por ekzerci sin ili faris pikadon unue sur siaj propraj korpoj, timante nek doloron nek viv-danĝeron. Fine ili ĉiuj bone ekposedis la kurac-arton por ordinaraĵ malsanoj.

Nun kiam iu vojaĝanto malsaniĝas ĉe la stacio, ili tuj ricevas helpon de tiuj "nud-piedaj kuracistoj". Vojaĝantoj laŭdas ilin, ke ili vere faris la stacion "hejmo de la vojaĝantoj".



SKRIBIS ALBANA LEGANTO I. P.

Kun granda ĝojo mi ricevis vian leteron kaj deklaron de Prezidanto Maŭ Zedong je la 20-a de majo 1970. Mi legis ĝin, kaj mia koro plenis de senfina amo kaj respekto al la granda gvidanto kaj revolucia instruanto de la tutmonda proletaro Prezidanto Maŭ, kiu ankoraŭfoje donis firman kuraĝon kaj grandan konfidon al la naciliberigaj bataloj de la popoloj de ĉiuj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj al la revoluciaj bataloj de la popoloj de Norda Ameriko, Eŭropo kaj Oceanio por venki la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn.

Do jam estas vero, ke "ne la vjet-nama popolo, la laosa popolo, la kamboĝa popolo, la palestina popolo, la arabaj popoloj kaj la popoloj de ĉiuj aliaj landoj en la mondo timas la usonan imperiismon, sed la usona

imperiismo timas la popolojn de ĉiuj landoj en la mondo".

Niaj du frataj popoloj albana kaj ĉina, ligitaj per Marksismo-Leninismo, kune antaŭenmarŝas kaj antaŭenmarŝos por plene faligi imperiismon kaj reviziismon.

Nia karega gvidanto Enver Hoxha diris: "Kiu tuŝas Albanion, tuŝas Ĉinion; kiu tuŝas Ĉinion, tuŝas Albanion."

En la 1-a de oktobro, la heroa 700-800-miliona ĉina popolo ĝoje celebros la 21-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Mi kore deziras al la ĉina popolo ankoraŭ pli grandajn sukcesojn sub la gvido de Maŭzedongpenso.

Vivu la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ!

Vivu la nerompebla amikeco inter la revoluciaj albana kaj ĉina popoloj!

Vivu niaj karegaj gvidantoj Enver Hoxha kaj Maŭ Zedong!

Vivu la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

SKRIBIS ALBANA LEGANTO B. M.

Mi bone ricevis la de vi senditan faman deklaron de Prezidanto Maŭ

koncerne la nuntempajn novajn faktojn de agreso kaj milito fare de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

La korvibriganta alvoko de k-do Maŭ al ĉiuj revoluciaj popoloj de la mondo por decideme batalrezisti la agreson eksteran, certe gajnos kaj ĝuos plenan subtenon de la vastaj popolamasoj, kiuj konsistigas pli ol 90% de la homaro.

Historia sperto de la albana revolucio, la ĉina revolucio, ĉiuj aliaj socialismaj kaj progresemaj revolucioj kaj la naciliberigaj kaj sendependaj militoj tute konfirmas la vortojn de Maŭ Zedong: Estas leĝo de historio la fakto, ke la popolo de malgranda lando (eĉ tiu de ekonomie malforta lando) certe povas venki agreson de grandpotenca lando, se nur ĝi kuraĝas leviĝi al batalo, kuraĝas preni armilojn kaj mastras la sorton de sia propra lando. K-do Enver Hoxha lastatempe diris: Imperiismo estas destinita al disfalo, sed tiu disfalo devas esti rapidigata. Por tiu celo, la popoloj havas nur unu armilon, nevenkeblan kaj neelĉerpeblan — ilian unuiĝon pri kiu alvokas en sia deklaro Prezidanto Maŭ.

Nova Trompo de Nixon

JE la 7-a de oktobro, 1970, la ĉefo de la usona imperiismo Nixon elmetis la tiel nomatan “gravan novan iniciaton por paco” rilate al la problemo de Hindoĉinio. Fakte, tiu ĉi “grava nova iniciato por paco” estas nenio alia ol kamufita artifiko de politika trompo ludita de la usona imperiismo en la problemo de Hindoĉinio. Tio estas mallerta trompo de Nixon-registaro por mistifi la usonan popolon kaj la publikan opinionon de la mondo kaj ruza intrigo por estingi la revoluciajn flamojn de la popoloj de Hindoĉinio.

La tiel nomata “nova iniciato” de Nixon konsistas ĉefe el kvin punktoj: 1) “ĉesigo de pafado ĉeloke” tra la tuta Hindoĉinio; 2) okazigo de “internacia konferenco . . . por trakti la konflikton en ĉiuj tri ŝtatoj de Hindoĉinio”; 3) “elaboro de interkonsentita tempotabelo por kompleta retiro de la trupoj pere de intertraktado kiel parto de plena solvado”; 4) “serĉo de politika solvo kiu vere plenumas la deziron de ĉiuj vjetnamoj”; 5) “tuja kaj senkondiĉa liberigo de ĉiuj militkaptitoj tenataj de ambaŭ flankoj”.

Se oni nur iom analizas la kvin punktojn de Nixon, oni nemalfacile vidos, ke tio ne estas ia “nova iniciato por paco” sed antaŭmorta barakto por savi la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn el la destino de fiasko kaj artifiko ludata por “laŭlegigi” la agresadon de la usona imperiismo en la tuta Hindoĉinio.

Kia varo estas la “ĉesigo de pafado ĉeloke” de Nixon? Nixon diris: “Ĉesigo de pafado devas ampleksi ne nur la batalon en Vjetnamio sed ankaŭ tiun en la tuta Hindoĉinio”, kaj devas ne nur “ĉesigi ĉiujn specojn de milito”, sed ankaŭ “ampleksi ĉiujn agadojn kiuj karakterizas tiun ĉi militon”. Li diris: “Mi proponas, ke ĉiuj armitaj fortoj tra la tuta Hindoĉinio ĉesigu pafadon de siaj armiloj kaj restu en la pozicioj kiujn ili nun okupas. Tio estos ‘ĉesigo de pafado ĉeloke’.”

Jen kia “ĉesigo de pafado ĉeloke”!

Ĉiuj scias, ke en la tri landoj de Hindoĉinio la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj kaj kurhundoj estas agresantoj, rabistoj kaj murdistoj, dum la tri popoloj de Hindoĉinio estas agresatoj. Estas la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kiuj sendis centmilojn da armeanoj en la teritoriojn de la tri popoloj de Hindoĉinio dum la lastaj ekspedis nenium soldaton en la teritorion de Usono. En tia cirkonstanco, Nixon eĉ ne hontas babilaĉi pri “ĉesigo de pafado ĉeloke”. Ĉu tio ne signifas postuli, ke la tri popoloj de Hindoĉinio agnosku la laŭleĝecon de la agresado farata de la usona imperiismo kontraŭ la tri landoj de Hindoĉinio!? kaj ke la tri popoloj de Hindoĉinio lasu la usonajn agresantojn resti kaj tirani ĉie sur ilia teritorio sed ne estas permesate al ili elpeli la usonajn agresantojn!? Ĉu tio ne signifas postuli ke la tri popoloj de Hindoĉinio estu senigitaj de sia sankta rajto fari nacisavan militon kontraŭ la usona imperiismo!? kaj ke ili surgenuiĝu kaj kapitulacu antaŭ la usonaj agresantoj!?

Nixon pledis por okazigo de “internacia konferenco . . . por trakti la konflikton en ĉiuj tri ŝtatoj de Hindoĉinio”. Li diris: “Tiu ĉi milito en Hindoĉinio estis pruvita kiel unu tuto; ĝi ne povas esti resanigita per kuracado de nur unu el ĝiaj regionoj de militeksplodo.”

Kiu faris la militojn en Hindoĉinio en “unu tuto”? Tiu estas ĝuste la usona imperiismo mem. Estas la usona imperiismo kiu faris agreson kontraŭ Kamboĝo, senĉese plivastigas kaj fortigas sian intervenon en Laoso, kaj tiel rapide disvolvis sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio en militon de plenampla agreso kontraŭ Hindoĉinio, puŝante la tri popolojn de Hindoĉinio al unuigo pli kompakta, por kune batali kontraŭ la komuna malamiko kaj per kontraŭagresa milito de “unu tuto” por rezisti kontraŭ la agresa milito en “unu tuto” farata de la

usona imperiismo. Kia “kuracado”! Ĝi estas nenio alia ol artifiko de ŝtelisto krianta: “Kaptu ŝteliston!” Se nur la usona imperiismo ĉesigos sian agresadon, retiros el Hindaĉinio ĉiujn siajn agresajn trupojn kaj tiujn de siaj lakeoj kaj ĉesigos ĉiujn siajn subtenojn kaj helpojn al siaj kurhundoj tie, tiam la problemo de la milito en Hindaĉinio certe povos esti solvita.

Nixon proponis plie “elaboron de interkonsentita tempotabelo por kompleta retiro de la trupoj pere de intertraktado”. Tio estas ekstrema absurdaĵo. La popoloj de Hindaĉinio, Usono kaj aliaj landoj de la mondo jam delonge per siaj agoj esprimis forte sian postulon al la usona imperiismo tuj retiri komplete ĉiujn siajn agresajn trupojn el Hindaĉinio, sed Nixon volas intertrakti “pri interkonsentita tempotabelo por kompleta retiro de la trupoj”. Kvankam ĉi tie li ne uzis kiel antaŭe la vortojn kiaj “komuna retiro de la trupoj”, tamen fakte li volas daŭre fari implikadon ludante la saman artifikon de “komuna retiro de la trupoj” por ke la usonaj agresaj trupoj daŭre restu en Vjetnamio.

La kvara kaj kvina punktoj en la propono de Nixon, nome: “politika solvo” de la problemo de suda Vjetnamio kaj liberigo de militkaptitoj, povos esti facile solvataj, se nur la usona imperiismo ĉesigos sian agresan militon kaj retiros el Hindaĉinio

ĉiujn siajn agresajn trupojn kaj tiujn de siaj lakeoj, kaj ne meritas zorgon de Nixon. Kiel Nixon mem konfesis, la “politika solvo” kiun li serĉas, celas teni la reakcian regadon de la kliko Nguyen Van Thieu — Nguyen Cao Ky en suda Vjetnamio, same li ankaŭ aludis tenon de la marioneta regado de Lon Nol — Sirik Matak en Kamboĝo.

La “nova iniciato por paco” de Nixon estas nenio alia ol nova trompo por kovri la agresadon. Apenaŭ ĝi estis lanĉita, ĝi tuj renkontis firman oponon de la tri popoloj de Hindaĉinio. En gazetara konferenco Ŝtatestro de Kamboĝo Norodom Sihanuk forte kondamnis la t.n. “novan iniciaton” de Nixon kaj esprimis, ke la kamboĝa popolo daŭrigos la batalon por liberigi sian landon el sub la regado de la usona imperiismo kaj la faŝismo de Lon Nol. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo plene subtenas la justan starpunkton de la tri popoloj de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso. Ni firme konvinkigis, ke la popoloj de la tri landoj certe elpelos la usonajn agresantojn el Hindaĉinio kaj certe gajnos ĝisfundan sendependecon kaj liberigon, kompakte unuigante unu kun alia, batalante ŝultron ĉe ŝultro kaj persistante en la popola milito. La usonaj agresantoj kaj iliaj kurhundoj, kiuj persistas ĉe la agresa milito en Hindaĉinio, certe trafos kompletan, hontindan fiaskon.



TRANSPLANTADO DE MALGRANDAJ RIZPLANTIDOJ KUNE KUN GRUNDO

Jam sukcesis la eksperimentado pri transplantado de malgrandaj rizplantidoj kune kun grundo en nia lando fare de la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la provincoj Ĝegiang kaj Fugian, kaj ekde 1970 oni komencis disvastigi tiun novan teknikon en grandaj areoj.

En transplantado de rizplantidoj laŭ tiu metodo, oni ĝenerale utiligas sekajn kampojn, draŝejojn kaj dislokitajn malgrandajn terspacojn kiel kampojn por kreskigi plantidojn, sur kies fundo estas sternata tavolo da fekunda

riverŝlimo. La semadon kaj flegadon oni faras sen akvumo. Transplantado estas farata 10 ĝis 15 tagojn post semado por frua rizo kaj 10 tagojn post semado por malfrua rizo, kiam la plantidoj estas kvar colojn alta kaj havas tri foliojn. Ili estas transplantataj kune kun la grundo ĉe la radikoj per ŝovelilo. En komparo kun la malnova metodo uzanta specialajn kampojn por kreskigi grandajn plantidojn, la nova havas la avantaĝojn de ŝparo de kampospaco, prevento de putriĝo de plantidoj kaj malprofunda enplanto sen plifrua kreskado de plantidoj, kaj tial ĝi povas akceli pliprodukton de rizo.

La sukcesa elprovo de tiu nova metodo rompis la rutinon de uzado de specialaj kampoj por kreskigi plantidojn, kaj la proporcia diferenco de spaco por plantidoj kaj tiu por rizplantoj ĉe kontinua kulturado de fruaj kaj malfruaj rizplantoj kreskis de 1:7-15 al 1:40-60 kaj pli, kaj krome la laborefiko de la demovo de plantidoj altiĝis 5-20-oble kaj pli.

La Vjetnama Popolo Decidis

Gajni Venkon per Batalo

JE la 10-a de oktobro de 1970 la vjetnama gazeto *Bao Nhan Dan* publikigis artikolon de komentariisto, kiu severe refutis la tiel nomatan "novan iniciaton" elŝovitan de Nixon, la ĉefo de la usona imperiismo, pri la hindoĉinia problemo. La artikolo montris, ke la celo de la "nova iniciato" de Nixon estas: efektiviĝi "Nixon-doktrinon", rapidigi la efektivigon de la intrigo de "vjetnamigo"

de la agresa milito, mildigi la kontraŭmilitan movadon de la usona popolo kaj akiri politikan kapitalon por la baldaŭa balotado en la Kongreso de Usono.

La artikolo diris, ke koncerne al la retiro de la usonaj trupoj, la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio jam montris: Usono nepre devas ĉesigi la agresan militon, nepre devas tute retiri el suda Vjetnamio siajn trupojn

Kontraŭaerataka trupo de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio faligis 8 malamikajn aviadilojn en unu tago en batalo por detruigi la postenojn de la usona agresa armeo sur altejo 935.



kaj alilandajn trupojn ĉe la usona flanko sen ajna kondiĉo. Sed tute kontraŭe al la ĝusta starpunkto de la vjetnama popolo, en sia parolado de la 7-a de oktobro Nixon ne nur ne esprimis pretecon tute kaj senkondiĉe retiri el suda Vjetnamio la usonajn trupojn, sed ankaŭ postulis por fari "intertraktadon" pri tiu problemo sur la bazo de la "principoj" de Usono. Esence tio metas la usonajn agresantojn kaj la kontraŭagresan vjetnaman popolon sur saman lokon kaj elmetas kondiĉojn por ĉesigo de la agresa milito kaj retiro de la usonaj trupoj.

La artikolo diris, ke koncerne al la problemo de memdecida rajto de la sudvjetnama popolo, la tiel nomata "paca iniciato" de Nixon insistas konservi la klikon de Thieu-Ky-Khiem por ke ĝi rolu kiel instrumento en la efektiviĝo de la usona novkoloniismo.

La artikolo montris, ke Nixon proponis "ĉesigon de pafo ĉe-loke" en la tempo, kiam la vjetnama popolo kaj tutmonda popolo postulas de Usono ĉesigon de agreso kaj tutan kaj senkondiĉan retiron de la usonaj trupoj. Kiam la usona registaro ankoraŭ ne volas ĉesigi agreson kaj troviĝas ankoraŭ ĉ. 400 miloj da usonaj trupanoj en suda Vjetnamio, la "ĉesigo de pafo" signifas agnoskon de la okupo de la usona ekspedicio kaj senigon de sankta memdefenda rajto de la vjetnama popolo kontraŭ la agresaj trupoj.

La artikolo diris, ke Nixon ankaŭ proponis okazigi internacian kunvenon por diskuti la problemon pri paco en Hindoĉinio. Kiel ekstreme cinika! Ĝuste estas Nixon, kiu faris eskaladon de milito kontraŭ Laoso kaj agrosis Kamboĝon, kaj tiel plivastigis la militon al la tuta duoninsulo de Hindoĉinio. Kaj ankaŭ estas Nixon, kiu manipulas la lakeajn klikojn en Vientiane kaj Phnom-Penh kaj energie incitas ilin oponi kontraŭ la laosa kaj kamboĝa popoloj, kiuj kondukas la kontraŭuson militon por defendi sian patrion. Ŝlosilo de solvo de la problemo estas: ĉu Usono volas ĉesigi la agreson kontraŭ la tri hindoĉiniaj landoj

aŭ ne. Estas nur trompo la internacia kunveno por diskuti la problemon pri paco en Hindoĉinio proponita de Nixon surbaze de agresemo kaj milito.

La artikolo diris, ke refoje elmetante la problemon pri "milit-kaptitoj" Nixon nur per vantaj vortoj "paco" kaj "humaneco" trompas publikan opinion kaj ŝirmas ekstreme barbaran krimon faritan de Usono en Vjetnamio.

La artikolo montris, ke la "kvinpunkta propono" de Nixon ne estas ia "grava nova iniciato pri efektiviĝo de paco", sed ruza rimedo servanta al la celo efektiviĝi "Nixon-doktrinon" kaj plirapidigi la efektiviĝon de la plano de "vjetnamigo" de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio kaj devigi la hindoĉiniajn popolojn akcepti kondiĉojn elmetitajn de Usono. La iniciato havas ankaŭ la celon mildigi la disvolviĝantan kontraŭmilitan movadon en Usono kaj akiri politikan kapitalon por la kompanio de Nixon en la baldaŭa balotado de la Kongreso de Usono.

La artikolo diris, ke la vjetnama popolo firme kondamnas la koloniisman ambicion de la usona imperiismo kaj ĝian malican rimedon de longigo de la milito. Estas justa la batalo de la vjetnama popolo kaj ĝusta la starpunkto de nia popolo. Nia popolo varme amas pacon, la veran pacon bazitan sur veraj sendependeco kaj libereco, sed ne nixonan pacon. La popolo de nia lando batalos ĝis kiam Usono ĉesigos sian agreson.

En la fino la artikolo diris, ke la armeo kaj popolo de Vjetnamio decidis realigi la sanktan testamenton de Prezidanto Ho, multimi vivoferon kaj malfacilon, persisti kaj akceli la batalon celantan sendependecon kaj liberecon kune kun la frataj laosa kaj kamboĝa popoloj, ĝis la kompleta venko. La kontraŭusona naciŝava milito de la tri popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo certe akiros brilan venkon! La usonaj imperiismaj agresantoj kaj iliaj lakeoj neniel forskuos la ĝisfundan fiaskon.

La bateria pozicio de la usona agresa armeo sur altejo 935 detruita de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio



POPOLAJ MANIFESTACIOJ EN PLI OL 30 USONAJ URBOJ

La 31-an de oktobro, 1970, miloj kaj miloj da usonaj popolanoj faris potencajn manifestaciojn en pli ol 30 grandaj kaj mezgrandaj urboj inkluzive de Novjorko, Vaŝingtono, Ĉikago, San-Francisko, Austin kaj Boston, por oponi kontraŭ la agreso de la usona imperiismo al Hinduĉinio kaj kondamni la t. n. "novan iniciaton" pri la hinduĉinia problemo antaŭ nelonge elmetitan de la ĉefo de la usonaj imperiistoj. Tio ĉi estas nova disvolviĝo de la revolucia amasa movado en Usono.

Inter la manifestaciantaj amasoj troviĝis laboristoj, studentoj, nigruloj, meksikanoj kaj popolanoj de aliaj socitavoloj. La manifestacion partoprenis ankaŭ la laboristoj de la Ĝenerala Motora Kompanio, kiuj jam persiste strikis dum unu kaj duona monatoj. Estas rimarkiginde, ke ankaŭ multaj usonaj soldatoj en servado kaj eksarmeanoj partoprenis la manifestacion, por esprimi sian firman oponon kontraŭ la malpura milito. Lastatempe, estis publikigita deklaro kune subskri-

bita de 1,700 armeanoj en servo, per kiu ili postulas "tuj retiri senkondiĉe ĉiujn usonajn trupojn el (suda) Vjetnamio por fini la militon kaj lasi la vjetnaman popolon mem aranĝi siajn proprajn aferojn". La armeanoj servantaj kaj eksigintaj, kiuj partoprenis la manifestacion en Austin, ĉefurbo de Texas, nombris 300 ĝis 400.

Sur la slogantabuloj tenataj de la manifestaciantoj skribiĝis: "Ni ne volas falsan pacan planon!" "Retiru ĉiujn trupojn jam nun!" "For la usona imperiismo el Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo!" En kunveno partoprenata de miloj da homoj en San-Francisko, iu parolanto montris, ke la "nova iniciato" de Nixon estas "ne akceptebla, ne praktikebla", kaj lia parolo rikoltis varman aplaŭdon de la manifestaciantoj. Ili esprimis, ke la usona popolo abomenas tiun ĉi militon kaj ne povas toleri ĝian daŭrigon.

Novjorkaj popolanoj de Usono manifestaciis je la 31-a de oktobro, 1970 por oponi kontraŭ la agresa milito de la usona imperiismo.



Korespondi Deziras

HISPANIO

Dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj: A. Honso Fernandez Robles, Villa Dominica 2 pabeilon 4 izda, Figaredo-Mieres, Asturias

SVEDLANDO

Bengt Alsen, Grona Vagen 52 B, s 54103 Skovde

David Zitka, strato Kallvagen 20, S- 712 00 Hallefors

POLLANDO

Jozef Roman Maksymisk, Ciec-homice 38, pto WRZACA, pow. Atupsk, woj. Koszalin

FRANCIO

Dez. kor. kun koreaj esperantistoj Louis Vannini Villa Adele, rue Tean Emile, F. 06 - Beausoleil

ĈEĤOSLOVAKIO

Dez. kor. kun geesperantistoj albanaj, vjetnamaj kaj koreaj. Otakar Nesnidal, Ujezd u Brna 679

Drahomir Hoza, Teškovice ĉ. 3, poŝta Kyjovice, Opavsko

ALBANIO

Dez. kor. kun diverslandaj geesperantistoj Pandeli Jartari, "Fakil Rada" pallati i ministrise sendesti mitsh 11 ap 19 Tirano

JUGOSLAVIO

Sic Stefanija - Novi Sad, Petrovaradin, Toze Vlahovie 16

BULGARIO

Vasil D. Velcev, 29-jara instruisto, Trakija-38 bx. B Gabrovo

Stefan P. Stefanov, 29-jara instruisto, str. V. Petleškov 4, Gabrovo 4

EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (150) 1971

Ĉefa Enhavo

Vizito de Albana Registara Ekonomia Delegacio al Ĉinio

Triumfa Kanto super Dropull-ebenejo

La Granda Amikeco el Sango

Nova Paĝo en la Amika Historio de Ĉinio kaj Koreio

Profunda Batala Amikeco

Antaŭenmarŝas la Heroa Jan-an-a Popolo

Nova Fizionomio de Vilaĝo Hin-an

La Ĉinaj kaj Albanaj Kunbatalantoj Interligiĝas Koron kun Koro

Naskiĝo de Granda Salminejo en Gianghi

Por la Sano de la Maŭritania Popolo

Giganta Ŝanĝiĝo en Pangin

Ĉa Jankjun Reformis Ŝpinmaŝinon

Vojo por pliprodukto de Arakido

Senfine Longa Verda Muro

Rondira Vendejo

Nova Trompo de Nixon

La Vjetnama Popolo Decidis Gajni Venkon per Batalo

Sur la kovrilo:

Pli fortikiĝas la revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter ĉinaj kaj albanaj korbopilka sportistoj.

Sur la dorskovrilo:

Brila korbopilka ludo de ĉinaj kaj albanaj sportistoj.

Laboristoj, kamparanoj kaj Soldatoj en Studo kaj Apliko de Filozofio

Forte kritikinte la misterigon de filozofio, Ŝaŭ Mejli, membro de la revolucia komitato de la Jimin-a Kvara Manĝaĵfabriko de Ŝanhajo kaj sekretario de la partia filio de ĝia intendanta grupo, helpas laboristojn studi filozofion kaj senĉese puŝas la amasan aktivadon de studo kaj apliko de filozofio al pli profunda disvolviĝo.






Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Erlangmiaŭ-komunumo, Henan-provinco, serioze studas la filozofian penson de Prezidanto Maŭ. Jen ili parolas pri sia kompreno en studo kaj apliko de filozofio dum laborpaŭzo.

Komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de la pekinaj trupoj aplikas la filozofian penson de Prezidanto Maŭ por direkti sian militan trejnon kaj grandigi sian batalan forton. Jen la batalantoj vige parolas pri sia kompreno en studo de filozofio dum ripozo.

Ĉiu familio de Sanguanmiaŭ-brigado de Henan-provinco fondis studrondon de filozofiaj verkoj de Prezidanto Maŭ. Jen






La laboristoj de la tria laborejo de la akvovitra fabriko de Kingdaŭ komandas sian produkton per la filozofia penso de Prezidanto Maŭ kaj ĉiumonate superplenumis sian produktan planon.

Guo Susu, batalanto el iu trupo de PLA, aplikis dialektikan materiismon en kuraco de oftaj malsanoj per elektra ekscito kaj akiris rimarkindan sukceson. Jen li faras kuracadon al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj instruas la kuracan metodon al "nudpiedaj kuracistoj" en kamparo de Ŝandong.

Song Juĝen, filino de malriĉkamparano, kaj ŝia patrino studas *Pri la Praktiko*.





Aplikante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ Ĝaŭ Puju (meza), batalanto el iu trupo de PLA, kuraĝe esploris novan vojon de akupunkturo, trovis kontraŭdirojn, faris konkretan analizon, faris kuracon dialektike kaj akiris sukceson en kuraco de surd-mutuloj per ikupunkturo.

Li Ĉangmaŭ (meza), veterana laboristo de la Dua Lana Ŝpinfabriko de Tiangin aplikas kune kun siaj kamaradoj dialektikan vidpunkton pri kvalito kaj kvanto por solvi la problemon pri la rilato inter multeco, rapideco, boneco kaj ekonomieco en la produktado.

Sub direktado de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ, laboristoj de la Velŝtofa Fabriko de Tiangin sukcese fabrikis novan teksilon, kiu ne nur multe pliiĝis la kvanton sed ankaŭ altigis la kvaliton de la produktaĵoj, kaj forte ŝanĝis la postrestantan fizionomion de la malnova entrepreno.







打败美国侵略者及其一切走狗！

